

**ESPERANTISTOJ DE SOVETUNIO,
KIUJ BATALIS KONTRAŬ NAZIOJ EN LA
2-A MONDMILITO**

**Kompilis
Anatolo Sidorov**



REU-2022

UDC 811.922.

ESPERANTISTOJ DE SOVETUNIO,
KIUJ BATALIS KONTRAŬ NAZIOJ EN LA
2-A MONDMILITO

Kompilis Anatolo Sidorov

Redaktis kaj aranĝis Nikolao Gudskov
Provlegis Svetlana Smetanina

Moskvo–Sankt-Peterburgo
REU–2022

ENKONDUKO

La ideo memoriĝi esperantistojn en la kontraŭfaŝisma agado ne estas nova. Naciaj Esperanto-Asocioj iniciatis ĝin ankoraŭ en la pasinta jarcento. Jen estas kelkaj ekzemploj:

Jonkov, Nenko. *La partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la kontraŭfaŝisma batalo // Bulgara Esperantisto*, 1974, N 9, p.5.

En la sekva kajero de la gazeto aperis listo de 227 esperantistoj bulgaraj, kiuj pereis kiel partizanoj aŭ mortis en malliberejo:

Bulgara Esperantisto, 1974, N 10/11;1984, n-roj 11 kaj 12.

Pri militeroj-esperantistoj en Jugoslavio ekzistas la sekva verko:

Vokoun, Franjo k.a., red., *Honore al ili. Memrolibro pri falintaj esperantistoj 1941-1945*. Zagreb, 1976¹.

La plej ampleksa verko pri la persekutoj kontraŭ Esperanto estas studo de Ulrich Lins *La danĝera lingvo*. UEA, Rotterdam, 2016, 375 p.

Ĉi-sube ni publikigas la liston de esperantistoj de Sovetunio, partoprenintaj la militon kontraŭ nazia Germanio, kies nomojn kaj vivindikojn ni sukcesis ekkoni².

La unua provo publikigi tiun liston estis farita antaŭ du jaroj okaze de la 75-jariĝo de la Venko super nazia Germanio en la revuo de REU "Cerbe kaj Kore" (n-ro 14, majo 2020, pp. 23-54). Poste aperis pluraj novaj informoj pri pliaj esperantistoj-militveteranoj, kiujn ni aldonas al tiu ĉi libreto. Komprenoble, la listo ne estas plena. Ne pri ĉiuj menciitaj personoj ni scias sufiĉe, ne ĉies fotojn ni sukcesis trovi. Tial ni petas ĉiujn legantojn laŭeble aldoni tion, kion ni ne trovis. Sendu viajn rimarkojn, aldonojn, pliiĝustigojn, fotojn ktp. al la kompilinto (anasido@gmail.com) kaj redaktinto (nikolao@yandex.ru), por ke ni povu plu perfektigi la libron.

La Kompilinto

¹ En tiu tre detala verko estas ĝustaj ciferoj kun "biografioj de esperantistoj pereintaj kiel batalantoj en la vicoj de partizanoj, mortigitaj en arestejoj, koncentrejoj, pendumitaj aŭ pafmortigitaj sur eŝafodoj aŭ pereintaj kiel ostaĝoj aŭ viktimoj de furioziĝinta faŝismo aŭ naziismo". "La ĝisnuna trarigardo montras 340 falintojn el 90 diversaj lokoj de Jugoslavio. De tiuj Popolaj herooj estas 37".

² La aŭtoro de ĉiuj artikoloj, krom aparte subskribitaj, estas A. Sidorov

Mallongigoj, renkonteblaj en la teksto:

Ĝenerale:

ASE – Asocio de Sovetiaj Esperantistoj;
BET – Baltia Esperanto-Tendaro;
CK – Centra komitato;
Del. – delegito;
Dir. – direktoro;
d-ro – doktoro;
dist. – distrikto;
E-o – Esperanto;
e-isto – esperantisto;
E-Klubo – Esperanto-klubo;
E-S – Esperanto-Societo;
EAE – Esperanto-Asocio de Estonio;
EKRELO – Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo;
eld. – eldonejo, eldono;
ekz. – ekzemplero;
E-1962 – jaro de esperantistiĝo;
Gub. – gubernio;
IAREV – Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj;
Inĝ. – inĝeniero;
kmn – komunumo;
KEB – Kolektiva Esperanta Biblioteko;
LiĤEA – Litova Esperanto-Asocio;
LŜU – Leningrada ŝtata universitato
MLEK – Moskva literatura Esperanto-klubo
MSU – Moskva ŝtata universitato
Nask. – naskiĝis;
PTT – Poŝto-Telegrafo-Telefono;
PEK – Proleta Esperanto-Korespondado.
Prez. – prezidanto;
Prof. – profesoro;
Ps. – pseŭdonimo;
RAS – Rusia Akademio de la sciencoj
Red. – redaktoro;
Reg. – regiono;
REŬ – Rusia Esperantista Unio;
SAT – Sennacieca Asocio Tutmonda;
SEJM – Sovetia Esperantista Junulara Movado;
Sokr. – sekretario;
SEU – Sovetlanda post 1926 Sovetrespublikara Esperantista Unio;
SSOD – Unio de Sovetiaj societoj de amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksteraj landoj;
TĤJO – Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo;
TEĤA – Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio;
TEK – Tallinna Esperanto-Klubo;
TES – Tartua Esperanto-Societo;
UEA – Universala Esperanto-Asocio;
UK – Universala Kongreso (de Esperanto);
Univ. – universitato;
u. – urbo;
vil. – vilaĝo;
v. – vidu;
(?) – montras nescion aŭ dubon.

Gazetaj kaj libroj:

CkK – Cerbe kaj Kore
DE – Der Esperantist;
EdE – Enciklopedio de Esperanto, HEA:
Budapest, 1986, 600 p.;
HdE – Heroldo de Esperanto;
InfEAE – Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio;
LOdE – La Ondo de Esperanto;
LS – Litova Stelo;
LM – Literatura Mondo;
LF – Literatura Foiro;
NDK – Nia Diligenta Kolegare. Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj. Kompilita de H.Gorecka, A.Korĥenkov. Litova E-Asocio, 2018, 320 p.
RE – Ruslanda Esperantisto;
REGO – Rusia Esperanto-Gazeto;
SkK – Scienco kaj Kulturo;
SR – Sennacieca Revuo



Andrejev, Nikolaj Dmitrijevič (16.02.1920, Petrogrado, — 15.11.1997, Sankt-Peterburgo). Sciencisto-filologo. Aŭtoro de ĉ. deko de verkitaj kaj de li redaktitaj sciencaj libroj.

En la 1938-41 studis en fizika-mekanika fakultato de Leningrada Ŝtata Universitato, sed ne finis ĝin pro la milito. Dum la 2-a mondmilito defendis Leningradon en artileria kanonaro. En 1942 ricevis medalon *Pro defendo de Leningrado*. Post la milito Andrejev ricevis ordenon *Ruĝa Stelo* kaj medalon *Pro la venko super Germanio en la Patrolanda milito 1941-1945*.

En la 1946-48 studis en fizika fakultato de LŜU, sed denove ne finis ĝin. En 1949-52 Andrejev laboris en Scienca Gorkij-Biblioteko ĉe LŜU. En 1952 kiel eksterulo finis filologian fakultaton de LŜU kaj

laboris en Ŝtata Publika Biblioteko kiel redaktoro-fakulo. Laŭ informo de Ruslanda Nacia Biblioteko Andrejev posedis 20 lingvojn de Eŭropo kaj Sud-Orienta Azio, kio permesis al li kompletigi fakojn de eksterlandaj literaturoj. En 1954 Andrejev ekŝiĝis el la Biblioteko. Ekde 1955 Andrejev laboris kiel docento de Orienta fakultato de LŜU. Laŭ lia iniciato en la Universitato estis fonditaj fakoj de vjetnama kaj indonezia filologioj.

En la 1957 Andrejev ricevis medalon *Je la memoro okaze de la 250-jariĝo de Leningrado*. Samjare estis eldonita lernolibro de Esperanto en 95000 ekz., kiu tre rapide disvastiĝis tra la tuta Sovetio. La fakto estis rimarkita en diplomatia legacio de Sovetio en Usono kiel montrado de la “kreskanta intereso al Esperanto en Soveta Unio”.

En 1958-65 Andrejev dediĉis sin al la ideo de maŝina tradukado. Rezulte en 1965 aperis libro *Statistika-kombinatorika simulado de lingvoj*.

Andrejev partoprenis en lingvistikaj kongresoj: X Bukareŝto (1967), XI Bolonjo (1972), XIV Berlino (1987).

En la 1996 Andrejev pro emeritiĝo ekŝiĝis el la Instituto de lingvistikaj esploroj de RAS.

Andrejev mortis en Peterburgo kaj estis enterigita en Smolenska tombejo.

Andrejev kun la edzino Lidia Dmitrijevna Kisil' konatiĝis dum la milito.

Bibliografio. Bibliografio de la verkoj de N. D. Andrejev estas grandega (vd., ekz. https://ru.wikipedia.org/wiki/Андреев,_Николай_Дмитриевич#Библиография)

Tamen por esperantistoj lia plej valora verko estas la unua oficiale eldonita en Sovetio post la 2-a mondmilito broŝuro:

Андреев, Николай Дмитриевич. Международный вспомогательный язык эсперанто: (Краткая грамматика и словарь-минимум) / Канд. филол. наук Н. Д. Андреев ; О-во по распространению полит. и науч. знаний РСФСР. Ленингр. отд.-ние. - Ленинград : [б. и.], 1957. - 47 с.; 20 см.



Astafjev, Pjotr Jefimoviĉ (07.07.1897, Samara, — 23.01.1987). Ĵurnalisto, pedagogo, Esperanto-poeto, tradukisto. Esperantisto ekde 1914. En 1921 en Esperanto-kolekto *Vortoj kaj Makuloj* aperis la unua poemo de Astafjev *La Nova Babilono*. Astafjev estas la unua organizinto de Esperanto-rondetoj en Samara en la 1925 ĉe



Maslennikov-fervojo-klubo. Astafjev laboris kiel teknika redaktoro en ĵurnalo *Golos svjazista* (Voĉo de komunikisto), en la 1925-33 laboris kiel teknika laboristo en la ĵurnalo *Voljskaja Kommuna* (Volgia Komunumo). Astafjev estis arestita la 14.10.1930, juĝita la 28.10.1930, sed liberigita sen enprizonigo, rehabilitita en la 1967. En la 1936 Astafjev plene dediĉis sin al la pedagogia laboro (komence en Smiŝlajevka apud Kujbiŝev, poste, reveninte en fino de la 1945 el la armeo, en Kirovskij regiono de Kujbiŝev). Post emeritiĝo en 1957 Astafjev plene dediĉis sin al tradukado: el la rusa al Esperanto kaj el Esperanto al la rusa. Aperis liaj tradukoj de Aleksandr Puŝkin kaj Vladimir Majakovskij.

Pri li:

Astafjev P. *Mia esperantista biografio* // *REGo*, 2017/4-5(101-102), p. 24-25.



Bajgarov, Vladimir Pavloviĉ (27.06.1909, vil. Visokovo, Peterburga gub.—1980, Leningrado). Esperantisto ekde 1929. Leningrada e-isto. Instruis E-on ĝis la 1939. Militservis ekde la 23.10.1931 kaj finis la 22.06.1956 en rango de subkolonelo. Dum la 2-a mondmilito ricevis du medalojn: *Pro la defendo de Leningrado* (1942) kaj *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*. Ordeno *Ruĝa Stelo* (1943); ordeno de la *Patrolanda milito* de la 2-a grado (1944); Jubilea medalo *30 jaroj de la Sovetiaj Armeo kaj Marfortoj* (1948); Medalo *Pro la militaj meritoj* (1948)



Baĵenov, Ivan Lvoviĉ (03.09.1901, Niĵnij Novgorod,—05.05.1995). Esperantiĝis en 1918, e-isto en u. Niĵnij Novgorod. En la 1921 Baĵenov studas en Niĵnij-Novgoroda Univ. Pro la partopreno en la 2-a mondmilito ricevis *Ordenon de la Patrolanda milito* de la 2-a grado (06.04.1985) kaj medalon *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*.

En la regiona ĵurnalo *Leninskaja Smena* (Lenina teamo) la 30.09.1981 kaj la 01.10.1981 aperis du artikoloj *Esperanto* verkitaj de Baĵenov. Membro de Komunista Esperanto-Kolektivo. Aŭtoro de “Lernolibro de la internacia lingvo Esperanto en 20 lecionoj”.

Bokarjov³, Jevgenij Aleksejeviĉ (25.02.1904, vil. Srednegorlik, gub. Stavropola, — 11.03.1971, Moskvo). Esperantistiĝis en la 1918, rusa lingvisto, profesoro, fakulo pri kaŭkazaj lingvoj, dum la tuta sia scienca agado okupiĝis pri interlingvistikaj problemoj, pri esperantologio; aŭtoro de *Rusa-E vortaro* (1966, 1989) kaj *Esperanto-Rusa vortaro* (1974, 1982).



Bokarjov naskiĝis en la familio de vilaĝa instruisto. La gepatroj loĝis en Dagestano, do estas tute nature, ke li iĝis renoma fakulo pri nordkaŭkaziaj lingvoj, doktoro de filologiaj sciencoj. Sed eble ankaŭ la fama dagestana multlingveco, ĉe kiu loĝantoj de najbaraj vilaĝetoj parolis malsamajn lingvojn, igis lin frue pensi pri la problemoj de komunikado inter diverslingvuloj. Jam en la 14-jara aĝo Jevgenij Bokarjov komencis okupiĝi pri Esperanto kaj restis konvinkita esperantisto ĝis la lasta spiro.

Fininte la lernejon, li studentiĝis en la lingvistika fakultato de Rostova Universitato. Tie la juna Bokarjov rimarkeble aktivis, gvidante plurajn Esperanto-rondetojn kaj eldonante murgazetojn. Li estis delegito de la 2-a (1925) kaj 3-a (1926) SEU-Kongresoj, poste membro de ties Centra Komitato. Kiel profesia lingvisto, Bokarjov partoprenis polemikon en la revuo *Izvestija C.K. SESR*, kuraĝe oponante la aŭtoritatan ideologon de SEU Efim Spiridoviĉ.

La reprezaliojn kontraŭ esperantistoj Bokarjov bonŝance evitis. Fininte la universitaton, li laboris en Norda Kaŭkazio, poste en Leningrado. Kiam komenciĝis la 2-a mondmilito, Bokarjov aliĝis kiel volontulo al defendantoj de Leningrado dum la blokado. Tie li estis grave vundita kaj enhospitaligita. Post la resaniĝo Bokarjov rajtis reveni al la scienca laboro, sed preferis daŭrigi la militservadon. Post la milito Bokarjov revenis en Leningradon en rango de majoro, kun multaj medaloj kaj ordeno. Ekde 1953 Bokarjov eklaboris en Moskvo, en la Instituto de Lingvoscienco, kie ĝis sia morto li estris la sektoron de kaŭkaziaj lingvoj.

Kiam meze de la 50-aj jaroj reaperis ebleco de Esperanto-agado, Bokarjov iĝis centra figuro de la renaskiĝaj procezoj. Li estis inter la unuaj, restarigintaj kontaktojn kun eksterlandaj esperantistoj. En la 1956 profesoro Bokarjov publikigis (kun O. S. Aĥmanova) brilan studon *Internacia helpa lingvo kiel lingvistika problemo* en la plej grava landa fakrevuo *Voprosi jazikoznaniĵa*; en sia instituto Bokarjov organizis sciencon sesion pri la problemoj de internacia lingvo. Samjare estis provo restarigi SEU, la refonda kunveno elektis Bokarjov-on prezidanto. Sed la provon fiaskigis oficialaj instancoj, Bokarjov ricevis partian riproĉon.

Tamen li ne mallevis la manojn kaj daŭrigis la Esperanto-aktivadon. En la 1957, prepare al la tutmonda junulara festivalo en Moskvo, Bokarjov iniciatis organizon de Esperanto-rondeto, tiel kontribuante al apero de la unua postpaŭza Esperanto-generacio. En la 1959 profesoro Bokarjov aktive partoprenis celebradon de la 100-jara jubileo de Zamenhof, en *Memorlibro pri la Zamenhof-jaro* aperis lia artikolo «Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof».

³ Ofte renkonteblas transliterigo *Bokarev*, kiu nekorekte reflektas prononcon de la nomo.

En la sama periodo Bokarjov kaj aliaj veteranoj insiste klopodis pri atribuo de iaj oficialaj kadroj al la reviviĝanta kaj vastiĝanta Esperanto-movado. Rezulte de leteroj kaj vizitoj al oficialuloj aperis paliativa solvo: en 1962 ĉe Unio de societoj de amikeco kun eksterlando estis kreita la Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj. Prezidanto de la Komisiono iĝis profesoro Bokarjov, sur tiu posteno li restis ĝis la vivofino. La Komisiono ludis tiutempe gravan rolon en renaskiĝo de internaciaj kontaktoj kaj en reapero de Esperanto-eldonaĵoj. Speciale menciindas la almanako *Por la paco* kaj sovetiaj numeroj de *Paco*, inter kies kontribuaĵoj ne mankis tiuj de Bokarjov mem. En la 48-a UK en Sofio (1963) li gvidis grandan grupon de sovetiaj esperantistoj, kiu signis revenon de sovetianoj sur la mondan Esperanto-arenon. Poste li gvidis delegitarojn al UK-oj en Hago (1964), Budapeŝto (1966) kaj Vieno (1970). Liaj dumkongresaj sciencaj prelegoj ĉiam altiris grandan atenton. En la 1963 profesoro Bokarjov estis elektita membro de la Akademio de Esperanto.



Laŭ iniciato de Bokarjov en la Instituto de Lingvoscienco fondiĝis kaj sub lia gvido sukcese funkciis sekcio de interlingvistiko, dum kies kunsidoj oni science diskutis esperantologiajn problemojn kaj kritike taksis novajn planlingvajn projektojn. La konvinko de Bokarjov pri supereco de Esperanto kompare kun ĝiaj rivaloj estis ne spekulativa, sed bazita sur konkreta scio: li praktike scipovis aliajn planlingvojn – Volapük, Ido, Occidental, Interlingua.

Bokarjov konstante defendis Esperanton en sciencaj rondoj kaj antaŭ vasta publiko. En la 1968 aperis la libro de Elmar Svadost *Kiel ekestos universala lingvo?* – studo grava interlingvistike, sed kontraŭ-Esperanta. Profesoro Bokarjov, estante respondeca redaktoro de la libro, sukcesis mildigi plurajn tro akrajn vortumojn de la aŭtoro, kaj la ĝeneralan malkonsenton kun ties pozicio esprimis en la redaktora antaŭparolo. Samjare en *Literaturnaja gazeta* (Literatura ĵurnalo) Bokarjov publikigis (kun akademiano Aksel Berg kaj profesoro David Armand) artikolon «64 lingvoj... kaj ankoraŭ unu» kun pledo por uzo de neŭtrala planlingvo en la sfero de scienc-teknika informado.



Malgraŭ sia streĉa okupateco, la profesoro regule partoprenis kunvenojn de Moskva Internacia Esperanto-klubo, volonte prelegis pri esperantologiaj temoj aŭ rakontis pri vizititaj de li Esperanto-aranĝoj eksterlande. Li estis homo ege modesta, helpopreta, kreanta ĉirkaŭ si etoson de trankvila laboremo. Estante la plej altranga esperantisto de la lando, Bokarjov neniam kriis aŭ orgojlis, tio kontraŭis lian internan delikatecon. Estimo de la esperantistaro al li estis profunda kaj reciproka. En 1962 estis elektita al AdE, kaj resis akademiano ĝis la morto.

La 11-an de marto 1971 pro subita koratako Bokarjov mortis – kiel vera esperantisto, ĉe la skribotablo, pridiskutante kun eldoneja redaktoro lastajn korektojn en la Esperanto-rusa vortaro. Tio estis legendeca morto – enviinda fino de la glora vivo.

Pro siaj dummilitaj heroaĵoj Bokarjov estis omaĝita per medaloj kaj Ordeno de *La*

Ruĝa Stelo (la 12.06.1944) kaj pro la lingvistikaj studoj ricevis Ordenon *Ruĝa Standardo* (la 27.03.1954).

Bibliografio⁴:

Bokarĵov E. A. *Rusa-Esperanta vortaro*, 1966, 536 p., 50.000 ekz.;

Bokarev E. *La internacia lingvosituacio kaj eblecoj de raciigo* // *Der Esperantist*, 1967/15, p.7-10;

Bokarev E. A. *Esperanto – la lingva kreaĵo de Zamenhof* // *Der Esperantist*, 1974/65-66 (3-4), p.28-30;

Bokarĵov E. A. *Esperanta-Rusa vortaro*, 1974, 488 p., 40 000 ekz.; 2-a reeldono 1982, 100 000 ekz.;

Русско-эсперантский словарь. Под ред. Е.Бокарева. Переизд. Душанбе, 1984, 536 с.;

Бокарев Е.А. *Проекты международных искусственных языков (1925-1970)*. (Projektoj de internaciaj artefaritaj lingvoj) // *Interlinguistica Tartuensis*. Vol. IV, Tartu, 1987, p.147-159;

Русско-эсперантский словарь. Под ред. Е.Бокарева; Послесл. Ф.Шукуров. Душанбе, 1989, 544 с., 50 000 экз.;

Бокарёв Е.А. *Эсперанто-русский словарь*. *Esperanta-rusa vortaro*. 2002, 308 p.; reviziita kaj kompletigita fare de Jurij Finkel (Uljanovsk) kaj Igor Galiĉskij (Severodvinsk).

Pri li:

Logvin A. *Memore al E. A. Bokarev* // *Der Esperantist*, 1971, № 47;

Aroloviĉ V. *Eŭgeno Bokarĵov – flagportanto de renaskiĝo*. Okaze de la 100-jara jubileo // *SkK*, 2004/2(52), p.2-4;

Aroloviĉ V. *Falgportanto de renaskiĝo*. Okaze de la 100-jara jubileo // *REGo*, 2004/1(20), p.1-2;

Bokarĵova A. *Sciencisto, esperantisto, patro: Eŭgeno Bokarĵov*. Moskvo, 2010, 144 p.;

NDK, p.40-41.

Danovskij, Nikolaj Faddejeviĉ (10.12.1905, Odeso, — 02.05.1988, Riga). Inĝeniero. Docento en aviada Ĵukovskij-Akademio, supera scienca redaktoro en la eldonejo Granda Sovetia Enciklopedio. Esperantistiĝis en la 1925. Partoprenis en la 2-a mondmilito. Li ricevis ordenon de la *Patrolanda Milito*. Konata elstara lingvoscianto, poeto, tradukisto kaj ĵurnalisto. Li verkis multegajn artikolojn en kaj pri



Esperanto, abunde tradukis, instruis, redaktis, gvidis korespondan kurson por tradukistoj. Li estis vicprezidanto de TEĴA kaj grave kontribuis por *Internacia Ĵurnalisto*.



Kunredaktoro de *Amikeco* kaj de sovetaĵoj de *Paco*. Kunlaboris en *Internacia Ĵurnalisto*, *Paco*, *Sezonoj*, *Unuiĝo* k.a. Dum sia loĝado en Moskvo li kelkjare gvidis tradukistan Esperanto-rondeton. En Esperanto-tendaroj li same okupiĝis pri esperantistoj-tradukemuloj. Danovskij produktis ŝajne senfinan vicon da artikoloj, eseoj, tradukoj de ŝtataj dokumentoj kaj beletraĵoj kaj Esperanto-versioj de kvar filmoj.

⁴ Grandegan fakan bibliografion de E. Bokarĵov eblas trovi en specialaj filologiaj fontoj.

Bibliografio:

Ŝoloĥov M. *La sorto de homo*. Tr. N. Danovskij, A. Agosti. Moskvo, : Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, 1965, 40 p.;

Lavrenev B. *La kvardekunua*. Tr. N. Danovskij, 1972;

Дановский Н.Ф. *Вводное слово в искусство перевода*. (Enkonduka vorto en la arton traduki), Riga, 1985 (samizdate multobligita), 132 p.; en 1986 reeldonita en Litovio;

Meditoj (1990, publikigita postmorte);

Lermontov M. *Princidino Mary*. El la rusa tr. N. Danovskij. Jekaterinburg: *Ruslanda Esperantisto*, 1996, 72 p., 400 ekz.;

Pri li:

Korotkeviĉ G. *Poeto, entuziasto, esperantisto // Sovetia Esperantisto*, 1989/7(8), p.1.

Dvorkin, Robert Aleksandroviĉ (04.01.1908, Sankt-Peterburgo—1976, Leningrado). Esperantisto ekde la 1926. La 01.08.1941 estis mobilizita al la Ruĝa armeo. Dum la 2-a mondmilito li ricevis ordenon *Ruĝa Stelo* (30.04.1945) kaj medalon *Pro la Defendo de Leningrado*.

Instruis E-n en Leningrado en la 1950-60-aj. Prezidanto de E-klubo en 1968-70.



Edelŝtejn, Vladimir Aleksandroviĉ (18.11.1920, Ĥarkov — 12.12.2010, Moskvo). Esperantistiĝis en la 1988. Moskva esperantisto-sciencisto. Finis Moskvan Ŝtatan Universitaton, profesie estis instruisto de matematiko. Veterano de la 2-a mondmilito. En Moskvo konstante loĝis ekde la 1954. Provis esperantistiĝi ankoraŭ en la 1938, sed komenciĝintaj reprezentadoj kontraŭ esperantistoj malhelpis. La dua – kaj sukcesa – provo okazis en 1987, kiam li finis kurson de A. Goŝĉarov. Edelŝtejn en la Esperanto-klubo *Lev Tolstoj* komencas provi esperantigi poemojn, poste ankaŭ verkis originale. Dum kelkaj jaroj estis tre aktiva kontribuanto al laboro de MLEK. Liaj tradukoj kaj originalaĵoj aperadis en *CKK*. Edelŝtejn forpasis komatrestante en la Sklifosovskij-klinikon kaŭze de la aŭtoakcidento.

Bibliografio:


Puŝkin A. *Boris Godunov*. Dramo. Tr. el la rusa V. Edelŝtejn. M.: *Impeto*, 2005, 112 p., 300 ekz.;

Edelŝtejn V. El A.S. Puŝkin. *Poeto*; el A.S. Puŝkin. *Botisto // Moskvaj sonoriloj*, v.p. 115-116;

Edelŝtejn V. *Kanto pri falko*. Elektitaj tradukoj. Moskvo: *Impeto*, 2010, 80 p.;

Pri li:

Edelŝtejn V. *Io pri mi // REGo*, 2010/5(60), p.22-24.



Erjuĥin (ruse: Ерюхин), **Aleksandr Prokopjeviĉ** (1901, vil. Ĥolmogori, gub. Arĥangelska, – 1959, Arĥangelsko). Ĵurnalisto. Naskiĝis en mezriĉa familio. En 1914 Erjuĥin translokiĝis al sia frato en Arĥangelsko. Dum la Intercivitana milito Erjuĥin dum tri monatoj miliservis en Blanka armeo. En la 1921-24 Erjuĥin miliservis en Ruĝa armeo en Tifliso. Post ekziĝo el la armeo revenis Arĥangelskon kaj komencis labori en PTT-servo kiel telegrafisto.

En la 1925 kaj 1926 li fondis Esperanto-rondeton ĉe la PTT-. Laŭ SAT-Adresaro en la 1928 Erjuĥin interesiĝis pri ekonomiko kaj politiko. En 1929 Erjuĥin gvidas Nordan filion de SEU. Membro de CK de SEU (1931).

En la 1926-29 Erjuĥin estis librotenisto en ŝparkaso. En la 1929 Erjuĥin edziĝis al lernatino de li gvidata Esperanto-kurso Ludmila Vojcickaja kaj aperis Esperanto-familio. En la 1929 Erjuĥin estas vicestro pri internacia informado ĉe la ĵurnalo *Pravda Severa* (Vero de Nordo). Ĉe la ĵurnalo Erjuĥin fondis PEK-centron, kiu havis abundan internacian korespondadon. Rezulte laŭ multjara PEK-laboro en 1932 aperis lia verko broŝurforma.

En la 1934 en sia *Raporto de SEU al la XVII Tutunia Kongreso de Komunista Laborista partio* estis menciita ĵurnalo *Pravda Severa* kiu dum 6 monatoj de 1933 aperigis ĉ. 70 leterojn de internaciaj korespondantoj. La Arĥangelska PEK-centro funkciis ĝis 1937.

Erjuĥin estis arestita en la 1937 pro sia abunda internacia Esperanto-korespondado. En la protokolo de la 30.05.1937 estas akuzo “pro ligo kun faŝismaj-tročkiismaj rondoj en eksterlando”, ankaŭ oni forprenis 22 Esperanto-leterojn. La 02.12.1937 li estis kondamnita al 6 jaroj da punlaboroj, sed la 08.12.1938 la Supera Kortumo de Sovetio reesploris la juĝaferon kaj malseverigis la verdikton ĝis 3 jaroj. La 28.03.1939 Erjuĥin ricevis liberon. Post la liberiĝo Erjuĥin laboris en ĵurnaleto *Lesnik Severa* (Arbaristo de Nordo). Dum la 2-a mondmilito Erjuĥin militservis en Norda fronto. Post la milito Erjuĥin denove estis ĵurnalisto en ĵurnaloj *Pravda Severa* (Norda Vero) kaj *Lesnik Severa* en Arĥangelsk, meze de 1950-aj li fondis Esperanto-rondetojn ĉe Domo de pioniroj, ĉe Pedagogia Instituto kaj ŝip-ripar-uzino *Krasnaĵa kuznica* (Ruĝa forĝejo).

Erjuĥin-familio: edzino Ludmila Vladimirovna Erjuĥina (nask. Vojcickaja) (1910-1994), du filoj: Valentin (1931), Viktor (1935); du fratroj Boris kaj Vasilij Erjuĥin estis kolĥozanoj en vilaĝo Ĥolmogori.

Bibliografio:

Jarlibro. Parizo-Lejpsiko-Moskvo: SAT, 1928;

Sennaciulo, 1929, № 261;

Ерюхин А. *Север в переключке с зарубежными пролетариями*, Архангельск, 1932. (Nordo en dialogo kun eksterlandaj proletoj);

Pri li:

EdE, p. 122;

Nonfan. *Nova etapo de Ĉina Esperanto-Movado // Esperanto*, 1958/3(628), p.48;

Responda letero de Sekureca servo N 18/C-1577, de la 10.01.1991;

Степанов Н. *Судьба эсперантиста // Правда Севера*, 27.09.1990;

Ерюхин В. *Эсперанто? Запретить! // Правда Севера*, 14.07.1991;

Сидоров А. *Ерюхин А. П. (1901-1959) // Конкордо*, 1997/33, p.2.

Fiŝbejn, Lev Grigorjeviĉ (01.01.1919, Luganska reg. — 28.03.2002). Ĵurnalisto. Veterano de la 2-a mondmilito.



Fiŝbejn naskiĝis en familio de tipografia laboristo. En la 1937 finis mezlernejon en Gomel. En la 1937 studis en Moskva Instituto de Minejoj, sed ne fininte ĝin partoprenis en la defendo de Moskvo kontraŭ invadintoj. En la 1943 en la fronta ĵurnalo *Por la Patrolando* estis publikigita artikolo *La agitanto – L. Fiŝbejn estas aktiva militkorespondanto de nia ĵurnalo* kun lia foto. Pro la partopreno en la milito li estis honorigita per ordeno de la *Patrolanda milito* de la 2-a grado kaj deko da medaloj. Post la milito Fiŝbejn estas kunlaboranto de la ĵurnalo *Standardo*. Li lektoris, gvidis Esperanto-rondetojn en lernejoj. En 1968 loĝante en Uzlovaja (Tula reg.) li rememoris, ke en la 1931-32-aj jaroj vigle korespondis kun germanaj esperantistoj.

Flejs, Efim Manujloviĉ (17.09.1903, Vitebsk, – 1979).

Meminstruita ĵurnalisto, verkisto. Naskiĝis en familio de fervojlaboristo. Post la Intercivitana milito Flejs estis sendita al Petrograda Komunista Universitato. Esperantistiĝis en la 1920. Flejs partoprenis en laboroj de la 3-a Tutruslanda (la 1-a Sovetia) Esperanto-kongreso okazinta en la 1921 en Petrogrado. En la 1923 ĉe komunista unuiĝo de junularo ekzistis du rondetoj por lerno de Esperanto, gvidataj de Flejs. Li ankaŭ partoprenis en la 6-a SAT-kongreso en Leningrado (1926). Poste li estis je dispono de Udmurta regiona komitato de junkomunistoj. En la 1926-29 Flejs aktive laboras en urbo Vjatka (nun Kirov): prezidis en gubernia SEU-filio, verkis versaĵojn kaj artikolojn. Samtempe li redaktis rakontokolekton *Granda Oktobro kaj civitana milito en Vjatka gubernio*. En la 1927-36 Flejs, kiel reprezentanto de la tutunia ĵurnalo *Izvestija* (Informoj) kaj samtempe redaktoro de regionaj gazetoj, laboris en Kazaĥio kaj For-Oriento. Li havis oficevojaĝojn al Semipalatinsko, Petropavlovsko, Gurjev, Ĥabarovsko k.a. En ĉi periodo aperis liaj rakontokolektoj.



Ekde la 1936 Flejs laboras en Ijevsko esplorante pri eminenta rusa verkisto Vladimir Korolenko (1853-1921). Dank' al la klopodoj de Flejs aperis kolekto de nepublikigitaj rakontoj de Korolenko sub redakto kaj kun enkonduka artikolo de Flejs. La laboron liaj kolegoj alte taksis kaj en la 1939 Flejs iĝis membro de la Unio de sovetiaj verkistoj.

Dum la 2-a mondmilito Flejs estas militkorespondanto ĉe stabo de Karelia fronto en la 14-a armeo. Post la milito Flejs estas korespondanto en redakcio de la ĵurnalo *Udmurtskaja Pravda* (Udmurtia vero). Flejs daŭrigis sian ĵurnalistan kaj verkistan karieron, tamen ne forgesante pri Esperanto. En ĉefurbo de Udmurtio – Ijevsko – li instruis Esperanton por tipografiaj laboristoj. Dank' al liaj klopodoj dum kelkaj jaroj bone funkciis Ijevskia Esperanto-rondeto.

Efim Flejs kun la edzino Maria Kuzminiĉna Subbotina havis tri filinojn.

Nomo de Flejs laŭmerite estas envicigita en biobibliografiaj informlibroj de Udmurtio⁵.

Pri li:

Писатели Удмуртии: биобиблиографический справочник. – Ижевск, 1989, с.392-393;

Писатели и литературоведы Удмуртии: биобиблиографический справочник. Ижевск, 2006, с.115.

Письменная Е. *С комсомольских беспокойных лет // Удмуртская правда*, 22.09.1988, № 219 (20229), 120 000 экз.

Gardi, Oskar Konstantinoviĉ (1896—1967?). Esperantisto ekde la 1916. Leningrada ĵurnalisto, E-instruisto kaj tradukisto. Membro de UEA. Gardi patroprenis en la 2-a mondmilito. Dum la batalo okazinta la 16.07.1943 Gardi estis kontuzita je la kapo kaj iĝis invalido de la dua grado. Pro la batalo ricevis *Ordenon Ruĝa Stelo* (16.07.1943). En la 1950-60-aj jaroj partoprenis en la urba E-movado de Leningrado.

Verko:

Гарди О.К. *Эсперанто – язык мира и дружбы. История возникновения и сущность международного вспомогательного языка*, Ленинград, 1960 г.



Genin, Miĥail Jefimoviĉ (17.10.1917, Oster, Ĉernigova reg.,— 05.03.1999, Kiev). Naskiĝis en familio de oficisto de kooperativo. Ekde la 1922 loĝis en Kievu. Militis ekde la 1939. Partoprenis en la 2-a mondmilito. Ricevis medalon *Pro la venko super Germanio dum la Granda Patrolanda milito 1941-1945* kaj *Ordenon de la Patrolanda Milito* de la 2-a grado (06.04.1985). Esperantiĝis en la 1959, sed aktivis en la E-movado urboskale post la 1975.



Gercikov, Grigorij Moisejeviĉ (14.06.1923, Borisov, Minska reg.—06.12.2008, San-Francisko, Usono). Tradukisto. Partoprenis en la 2-a mondmilito kiel tradukisto. Gercikov estis arestita la 13.08.1943, kondamnita 02.10.1943 al 10 jaroj de prizono; rehabilitita la 10.08.1956. Esperantiĝis en la 1972 en Talgar (Kazaĥio). En la 1980-aj publikigis E-lecionojn en ĵurnalo de Alma-Ata. Partoprenis en SEJT-oj en 1976 (Tiĥvin), 1977 (Poltava). Ekde la 1993 loĝis en San-Francisko, kie nomis sin *Greg Gregory*.

Pri li:

Лапидус А. *Дырка от бублика*.

https://kartaslov.ru/книги/Аркадий_Лапидус_Дырка_от_бублика_1_Байки_о_вкусной_и_здоровой_жизни/1

Gramenickij, Sergej Aleksandroviĉ (22.02.1896, Tomsk-?). Gramenickij finis Leningradan Agrikulturan Instituton kaj Pedagogian Hercen-Instituton. Partopreninto en

⁵ Liston de liaj verkoj vd., ekz.: https://ru.wikipedia.org/wiki/Флейс,_Ефим_Мануйлович#Сочинения



Intercivitana milito en Rusio. Esperantiĝis en 1910. Krom Esperanto posedis Idon kaj Interlingvon. Provis reformi Esperanton kaj internaciigi ĝin. Partoprenis en la 2-a mondmilito kiel super-leŭtenanto. Loĝis en Novgorodo.

Grigorjev, Viktor Petrovič (14.03.1925, Moskvo — 09.02.2007, Moskvo). Doktoro pri filologio, profesoro.

La 16.10.1941 Grigorjev partoprenas en la konstruado de kontraŭtankaj fosajoj ĉe Kuncevo. En la 1942 kiel eksterulo finas mezlernejon kaj venas al la fronto. En la 1943 estante kanon-direktisto li estis serioze vundita ĉe u. Staraja Russa. Postmilito studis en filologia fakultato de Moskva Universitato, sed finis fakultaton de la Rusaj lingvo kaj literaturo de Pedagogia Potjomkin-Instituto. Ekde la 1952 laboris en Scienca Akademio de Sovetio, samtempe estas respondeca sekretario de la ĵurnalo *Voprosi Jazikoznaniĵa* (Lingvistikaj problemoj). Ekde la 1958 Grigorjev laboras en Instituto de la Rusa Lingvo (nun Vinogradov-Instituto).

Grigorjev estas fakulo pri poezia lingvistiko (aparte – pri kreado de la rusa poeto-futuristo Velimir Ĥlebnikov), ĉefa scienca kunlaboranto de la Instituto de la Rusa lingvo, laŭreato de la Puŝkin-premio de la Ruslanda Akademio de Sciencoj (1995), populariganto de interlingvistiko kaj esperantologio, de la Akademio de Esperanto en la 1976-1985, profesoro, aŭtoritata rusia lingvisto, aŭtoro de dudeko da libroj kaj tricento da artikoloj. Lingvisto kaj interlingvisto; redaktinto de *Esperanto-Rusa Vortaro* (1974), aŭtoro de pluraj artikoloj pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Viktor Grigorjev forpasis la 9-an de februaro 2007 en Moskvo pro koratako.

Bibliografio⁶:

Григорьев В.П. *Из прошлого лингвистической поэтики и интерлингвистики*. Изд. 2-е., доп. М.: Едиториал УРСС, 2004, 192 с., 500 экз.;

Pri li:

Kolker B. *Forpasis Viktor Petrovič Grigorjev* // *REGo*, 2007/2(39), p.31.



Grozmani, Nikolaj Vladimirovič (29.10.1910, Vladikavkaz—27.08.1970, Leningrado). De la infaneco posedis tri lingvojn — la francan, anglan kaj germanan. Esperantisto ekde la 1925. Membro de la Leningrada filio de SEU en la 1931-32. Partoprenis en la 2-a mondmilito ekde 15.05.1942. Pro la militaj agoj ricevis *Ordenon Ruĝa Stelo* (20.04.1944), *Pro la defendo de Leningrado* kaj *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945* (09.05.1945).

⁶ Vidu la bibliografion de V. Grigorjev: https://www.ruslang.ru/bibl/grigor_ev.pdf

Li laboris kiel masonisto, stukisto, seruristo. Specialisto pri aŭtomobil-transporto (finis Leningradan Aŭtovojan Inst.). Vicestro de ĉiuj trafikoj por transportado de pasaĝeroj en Leningrado.

Aktivis en la E-movado ekde la 1958, ĉefe urboskale, gvidis kursojn por komencantoj, preparis por eldono E-vortaron, de la 1962 partoprenis kelkajn BET-ojn. Mortis en la 1970.


Pri li:

Грозмани, Юрий. *Герой обороны Ленинграда капитан Николай Грозмани: После революции лишился своего «Роллс-Ройса», разработал советский электрический автобус и мечтал, что язык эсперанто спасёт мир во всём мире.* 2020 г.



Hallop, Ernst Janovič (31.03.1908, Gatčina, Rusio — 06.10.1980). Hallop en la 1915 revenis al Estonio (Kasaritsa), lernis en Võru, en Tartu-a artlernejo *Pallas*, en 1934 vizitis Moskvon kaj Leningradon, en 1935 vojaĝis al Londono, Parizo, Italio, laboris dekoraciisto en Võru. En la 1941 Hallop estis mobilizita en la Ruĝan armeon. Post la milito laboris pentroartisto en Tallinn. Membro de la Unio de Sovetiaj pentristoj. Vojaĝemulo, vizitis nordajn regionojn de Siberio. En la 1930-aj jaroj Hallop estis aktiva Esperanto-instruisto en diversaj lokoj de Estonio, i.a. gvidis Esperanto-kurson en Parizo 1935.

J. Ojalo.



Ĥakkarajnen, Tojvo Aleksandrovič (31.05.1907, Sestroreck, Sankt-Peterburga gub. — 19.10.1983, Sortavala, Karelia ASSR). Lüdevene finno. Sociaganto, veterano de la 2-a mondmilito, pentristo, regionesploranto, merita laboristo pri kulturo de Karelia ASSR ankaŭ de Rusia Fedaracio (1965).

Patro: Aleksandr Andrejevič Ĥakkarajnen havis du filojn Sulo (1905-1938) kaj Tojvo (1907).

Post fino de la lernejo Tojvo lernas en teknikumo de urbeto Rjabovo.

En la 1929-36 Ĥakkarajnen laboris tradukisto en Petrozavodsko kiel en trusto *Karellies* (=Karelia arbaro), poste fakestro de Kareliaj regionaj komitatoj de komsomolo kaj bolŝevista partio.

En la 1936-37 li laboris en ĵurnalo *Ruĝa Karelio* kiel pentristo-retuŝisto pri la fotoj.

En la 1937-39 li laboris artstudioestro en respublika domo de la popola kreado. En la 1938 oni elektas lin kiel sekretario de la Unio de pentristoj de Karelia resp.

Ĥakkarajnen estas partoprenanto de la du Soveti-Finnlandaj (1939-40) kaj (1941-44) militoj.

Post malmobilizo en rango de kapitano, havante invalidecon la 2-a grado Ĥakkarajnen en 1945 estis sendita al Sortavalo kie li estis estro de artstudio.

En 1967-82 li estas respondeca sekretario de Sortavala filio de la Tutlanda Societo pri Naturprotektado. Li aranĝis koruson de finna kantaro (1951), fondis muzeon de milita gloro en Oficira Domo, aktive partoprenis en vivo de la urbo kaj finna komunumo, helpis en disvastigo de la scioj pri la historio de la teritorio ĉe loka loĝantaro ankaŭ gastoj de Norda Ladoga lagbordo.

Ĥakkarajnen estas fondinto de petrozavodska Esperanto-klubo *Norda Dianto*.

Tojvo kaj lia edzino Alina Aleksandrovna Ĥakkarajnen havis filinon Ninel Hakkarajnen (1938). Ŝi estas inĝeniero-konstruistino, hidroteknikistino, ekologo. Ninel estas kunfondinto de petrozavodska Esperanto-klubo *Norda Dianto* en 1986. La klubo funkciis ĝis 1989.

En la 2001-07 la Nacia Arkivejo de Karelia resp. deponis ricevatajn materialojn de Tojvo kaj Ninel Ĥakkarajnen.

En la 1-a parto estas deponitaj sekvaj objektoj: personaj dokumentoj, materialoj de la profesia kaj socia agadoj, korespondajaro kun oficialaj kaj sociaj organizaĵoj ankaŭ apartaj personoj; gratulfolioj, diplomoj de ministerioj kaj organizaĵoj, temaj materialoj, fotoj personaj kaj kolektivaj, kun kolegoj, parencoj, lernintoj, veteranoj de la Granda Patrolanda milito.

En la 2-a parto estas deponitaj materialoj laŭ scienca, profesia kaj socia agadoj, leteraro kun en- kaj eksterlandaj organizaĵoj pri problemoj de ekologio, naturprotektado, varmoenergio, artikoloj, notoj de multaj aŭtoroj pri agado de esperantistaj societoj, materialoj pri la apero kaj disvastiĝo de la lingvo Esperanto, programoj, laborplanoj kaj fotoj de la membroj de Esperanto-klubo *Norda Dianto*.

En la 1970 okaze de la 100-jariĝo de la naskiĝo de Vladimir Lenin Ĥakkarajnen ricevis medalon *За доблестный труд* (=Pro la senlaca laborado).

En 2007 okaze de la 100-jara jubileo Tojvo Ĥakkarajnen ricevis titolon de la *Honora civitano de u. Sortavalo*. Lian nomon portas regiona muzea-turisma centro de la Norda Ladoga lagbordo en urbo Sortavalo.

Bibliografio:

Агапов В.М., Хаккарайнен Т.А. *Художники на Валааме*. Петрозаводск, 1967 (reeldonoj 1978, 1983);

Судаков В. *Гражданин города Сортавала Т.А. Хаккарайнен* // Краевед Карелии, Петрозаводск, 1990, с.140-147;

Созвездие Хаккарайнен // Автор-сост. Н.Хаккарайнен, М.Скрипкин, В.Судаков. Петрозаводск, 2007;

Два автографа // *Свет Валаама*, 2007 г., № 1 (1), с.6;

Карелия: энциклопедия в 3 томах. (см. Т. 3, с.223). Петрозаводск, 2011, 384 с.:

Сидоров А.В. *Эсперанто-движение на Северо-Западе России*. Санкт-Петербург, 2014, 160 с., (см.с.64-70).

Ĥitun, Vsevolod Andrejeviĉ (08.12.1914, Benderi—1975, Lenigrado). En la mezo de marto 1932 en Aŝhabado inciate de Ĥitun estis aranĝita poŝtkart-vespero kaj granda ekspozicio. Finis fizikan fakutaton de Leningrada Ŝtata Univ.



Ĥitun partoprenis en la 2-a mondmilito ekde la 22.07.1941. Pro la militaj agoj li estis dekorita per medaloj *Pro la militaj meritoj*, *Pro la defendo de Leningrado*, *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*, per ordeno *Ruĝa Stelo*. Post la milito instruistis en Leningrada Milit-Medicina Akad.

Verkaj:

Хитун, Всеволод Андреевич. *Счётчики ядерного излучения и счётные устройства*. Moskva; Leningrad: Госэнергоиздат, 1959, 72 с., (Массовая радиобиблиотека; вып. 338);

Hitun V.A. *Contoare pentru radiații nucleare și dispozitive de numărât*. București: Ed. tehnică, 1962, 95 с.; (*Счётчики ядерного излучения и счётные устройства, на румынском языке*).

счётные устройства, на румынском языке).

Ĥvorostin, Stepan Konstantinoviĉ (24.11.1905, Samara--1994?, Sankt-Peterburgo). Profesoro. Historiisto. En 1917 Ĥvorostin venas al Petrogrado. Esperantiĝis en 1929. Membro de SEU (1930-34).



Ĥvorostin partoprenis en la 2-a mondmilito ekde la 05.07.1941. Pro la militaj agoj ricevis medalon *Pro la militaj meritoj* (1945); medalon *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*; medalon *Pro la venko super Japanio*; ordenon de la *Patrolanda milito* de la 2-a grado.



Aŭtoro de la verko *Cara cenzuro kaj Esperanto* (1972). Prez.

de la Leningrada E-klubo ĉe Kirova-kultur-domo (1974-76). Membro de Leningrada EK *Espero*. Laboris en Biblioteko de Krupskaja-Inst.

Verkaro:

Ĥvorostin S.K. *Cara cenzuro kaj Esperanto // Scienca Revuo*, vol. 23, 1972/1-2, p. 37-46; N 3, p.79-88;

Ĥvorostin S.K. *Cara cenzuro kaj Esperanto // LS*, 1994/5, p.1-9; N 6, p.10-17.



Juskoviĉ (ruse: Юскович), **Vasilij Fomiĉ** (28.02.1903, vil. Ŝĉerbovo, gub. Bresta,—02.04.1980, Moskvo). Fizikisto-metodisto. D-ro pri pedagogiaj sciencoj (1971), profesoro (1972). Finis 2-an Moskvan Ŝtatan Universitaton (1930). Laboris kiel instruisto pri fiziko en For-Oriento. En 1936-41 instruis en Uljanovska Inst. Juskoviĉ estis arestita la 28.07.1938, liberigita la 26.01.1939.

Juskoviĉ partoprenis en la 2-a mondmilito ekde 23.09.1943. Estis dekorita per medalo *Pro la venko super Germanio dum la Granda Patrolanda milito 1941-1945*, kaj ordeno *Ruĝa Stelo*.

Ekde la 1946 en Moskvo: en Scienc-Esplora Akademio (1946-58), en Moskva Ŝtata Pedagogia Instituto (1959-65). En la 1966-70 en GDR li preparadis instruistojn en sfero pri metodiko de fiziko.

Memdidakte ellernis Esperanton en la 1920, spertiĝis ĉe V. Svistunov; membro de MEM ekde la 1978, estrarano de ASE ekde la 1979.

Ĵubit, Kriŝjan Jurjeviĉ (06.05.1895 – 29.03.1989). Latvo. Vilaĝa instruisto. Partopreninto en la 1-a kaj 2-a mondmilitoj, en la Granda Oktobra revolucio. Komence de la 1920-aj jaroj por la 25-a Ĉapajev-divizio venis ordono studi Esperanton. La ruĝarmeanoj studis la lingvon dum du jaroj po 2 horoj ĉiusemajne (*Ogonek*, 1988/8, p.4).

La 22.06.1941 Kriŝjan Ĵubit estis mobilizita en Elgava por militi kontraŭ faŝismo. Pro la bataloj li ricevis ordenon *Milita Ruĝa Standardo* kaj ordenon *Ruĝa Stelo*. Kriŝjan Ĵubit la militon finis en Berlino. Post la milito Ĵubit estas direktoro de vilaĝa lernejo.



Kolobanov, Fjodor Ivanoviĉ (11.12.1900, u. Jegorjevsk, Moskva reg. – ?). Esperantisto ekde 1914. Partoprenis en la 2-a mondmilito. Estis dekorita per la medalo *Pro la defendo de Leningrado* (02.11.1943) kaj medalo *Pro la venko super Germanio en Granda Patrolanda milito la 1941-1945*.

E-instruisto en Leningrado en la 1956-57.

Kopelev (Kopeleviĉ), Lev Zinovjeviĉ (Zalmanoviĉ) (09.04.1912, Kievo, — 19.06.1997, Kolonjo, Germanio). Germanisto, fakulo pri germana literaturo, disidentulo kaj defendanto de la homrajtoj. Naskiĝis en familio de agronomo. Esperantistiĝis en la 1926 en Kievo. SAT-ano. En la libro de rememoroj “Kaj mi kreis al mi idolon” (И сотворил себе кумира), 1978, li emociie rememoris pri sia korespondado kun alilandanoj kaj pri la kontraŭnaciisma agado de SAT. Kvankam jam ĝenerale rifuzinte idealojn de esperantismo, li multe dankas al sia esperantista edukado, kiu ne permesis al li fali en abismon de ajna naciismo, ŝovinismo kaj nacia malamo.




Лев Копелев, август 1941

En la 1926 la familio transloĝiĝas al Ĥarkov. Laboris redaktoro de novaĵoj en Ĥarkova Komintern-uzino produktanta vaporlokomitivojn. En la 1933 studas en Ĥarkova Universitato, sed en la 1935 transiĝis al Moskva Instituto de fremdaj lingvoj.

Ekde la 1938 Kopelev instruas en Moskva Instituto de la filozofio, literaturo kaj historio. Kopelev ĝis la 1937 partoprenas en Esperanto-movado de moskvaj esperantistoj.

Post la komenco de la 2-a mondmilito Kopelev servis kie tradukisto kaj propagandisto. En la 1945 Kopelev estas arestita kaj kondamnita al 10 jaroj de prizono, liberigita en la 1954, rehabilita en 1956. En la prizono li estis dum certa tempo kune kun Aleksandr Solĵenicin (en sekreta instituto en Marfino) kaj fariĝis prototipo de Lev Rubin en la romano "En la unua rondo".

En la 1957-69 Kopelev instruis en Moskva Poligrafia Instituto kaj samtempe laboras kiel scienca konsultisto en Instituto de historio de la artoj. En la 1964-65 vizitis GDR. Ekde la 1966 Kopelev aktive partoprenas en disidenta movado. En la 1968 Kopelev estas eksigita el Komunista partio kaj Unio de Verkistoj. En la 1977 al Kopelev estas malpermesite instrui kaj eldoni verkojn. En la 1980 dum vojaĝo en GDR li estis senigita de sovetia civitaneco. Ekde la 1981 Kopelev estas profesoro de Vuppertala Universitato, poste honora doktoro pri filozofio de Kolonja Universitato. En la 1981 Kopelev ricevas civitancon de FRG. Kopelev estis membro de Pen-klubo kaj Unio de verkistoj de FRG. En la 1990 oni redonis al Kopelev sovetian civitancon. Lev Kopelev mortis en Kolonjo. En la urbo estas fondita Kopelev-fonduso kaj muzeo.



Pro la partopreno en la 2-a mondmilito Kopelev estis distingita la 11.03.1943 per ordeno *Ruĝa Stelo*; la 19.11.1943 per ordeno de la *Patrolanda milito* de la 2-a grado.

Premioj: en la 1980: Friedrich-Gundolf-premio; en la 1981: Pacpremio de la Germana Librokomerco (Friedenspreis des Deutschen Buchhandels); en la 1983: Lessing-Ringo kune kun la Kulturpremio de la Germanaj Framasonoj (Kulturpreis der deutschen Freimaurer); en la 1991: Erich-Maria-Remarque-pacpremio, kune kun Anja Lundholm; en la 1991: Ŝtata Premio de la Federacia Lando Nordrejnjo-Vestfalia (Staatspreis des Landes Nordrhein-Westfalen).

Kopelev estas aŭtoro de trideko da verkoj pri germanaj literaturo kaj verkistoj, ankaŭ pri disidenta movado.

Kopelev-familioj: lia unua edzino ekde 1930 Nadeĵda Kolĉinskaja, lia samklasanino, filinoj Maja kaj Helena;

La dua edzino ekde 1956 Raisa Davidovna Orlova, filinoj Svetlana kaj Maria.

Pri li kaj liaj verkoj vd., ekz.:

https://ru.wikipedia.org/wiki/Копелев,_Лев_Зиновьевич

Korotkeviĉ, Georgij Jakovleviĉ (01.09.1916, Mogiljov, Belorusia SSR, -?). Ĵurnalistoj. Membro de la Unio de ĵurnalistoj de Sovetio. Esperantisto ekde la 1932. ASE-estrarano. Kunredaktoro de la *Informbulteno de ASE* (1980-90).

En la 1932-35 Korotkeviĉ lernis en Moskva teknikumo pri fremdaj lingvoj. Lingvosciroj de germana, angla, pola, rumana kaj Esperanto. Korotkeviĉ partoprenis la 2-an mondmiliton en la Ruĝa armeo en rango de kapitano de sekureca servo dum la 1937-1942.



Estis distingita per la medalo *Pro la venko super Germanio dum la Granda Patrolanda Milito 1941-1945* kaj medalo *Pro la Militaj meritoj* (20.09.1943).

Tuj post la fino de la milito Korotkeviĉ apartenis al tiuj sovietiaj oficiroj, kiuj helpis forigi ruinojn. Kiel ano de la sovietia milita administrejo Korotkeviĉ laboris kiel ĵurnalisto, havis intimajn kontaktojn kun Eduard Claudius, Johannes R. Becher. De Kulturligo de GRD Korotkeviĉ ricevis oran medalon.

En la 1981 okaze de la 50-jariĝo de moskva metrookonstruado Korotkeviĉ publikigis en la profesia ĵurnalo *Metrostrojevec* (Metrookonstruanto), N 65 de la 10.06.1981 riĉajn rememorojn en la artikolo “Metroo plibeligas” pri la konstruado de la unua linio de la metroo kaj partopreno en ĝi de la moskvaj esperantistoj. Sub la influo de la prezentita informo MIEK abonis la ĵurnalon por ĉiuj klubanoj.

Bibliografio:

Kороткевич Г.Я. *Венгрия 1940-1949 годов*. Стенограмма лекций. Высшая партийная школа при ЦК ВКП(б). Москва: Типография Высш. парт. школы, 1950, 40 с.;

Короткевич Г.Я. *Венгрия в 1918-1939 годах*. Лекция. Высшая партийная школа при ЦК ВКП(б). Кафедра всеобщей истории. Москва, 1951, 27 с.;

Короткевич Г.Я. *Венгрия в 1918-1953 годах*. Учебный материал. Высшая партийная школа при ЦК КПСС. Кафедра всеобщей истории. - Москва, 1953, 63 с.;

Короткевич Г.Я. *Буржуазно-помещичья Венгрия. (1918-1944 гг.); Возникновение и развитие строя народной демократии в Венгрии*. Лекции. Высшая партийная школа при ЦК КПСС. Кафедра всеобщей истории. Москва, 1955, 64 с.;

Короткевич Г.Я. *Австрия на первом этапе общего кризиса капитализма (1918-1938 гг.)*. Учебный материал. Высшая партийная школа при ЦК КПСС. Кафедра истории международного рабочего и национально-освободительного движения. Москва, 1956, 43 с.

Korotkeviĉ G. *Iom pri funkcio de lingvoj kaj la problemoj de Internacia Lingvo // Der Esperantist*, 1974/3-4 (65-66), p. 39-40;

Korotkeviĉ G. *David Lvoviĉ Armand // DE*, 1977/2 (82), p.8-9;

Korotkeviĉ G. *Naskita sub la signo de la Dekreto de Lenin // DE*, 1977/4 (84), p.9-11; N 5 (85), p.1-4;

Korotkeviĉ G. *Tio okazis en la neforgesebla 1945 // DE*, 1985/5 (133), p.97-99;

Rezinovskij, Jakob Hirŝeviĉ. “*La Bolŝeva Labora Komunumo de OGPU*”. Tr. G.Korotkeviĉ // *DE*, 1990/1 (159), p.14-15.

Короткевич Г. Достоверность и точность – главное достоинство информации //

Информационный бюллетень АСЭ, Москва, 1980/2-3 (3-4), с.25-28;

Короткевич Г. В гостях у эсперантистов ГДР // Информационный бюллетень АСЭ, 1980/4 (5), с.8-9;

У эсперантистов Белоруссии. Перевёл с белорусского Г.Короткевич // Информационный бюллетень АСЭ, 1981/4 (11), с.7-9;

Короткевич Г. Международные встречи. В болгарском городе Шумене // Информационный бюллетень АСЭ, 1981/5-6 (12-13), с.9-11;

Короткевич Г. Гости из народной Болгарии // Информационный бюллетень АСЭ, 1981/8-9 (15-16), с.9-10;

Короткевич Г. Деятельность местных организаций. Гости из Молдавии // Информационный бюллетень, 1983/1 (28), с.14-15;

Из истории эсперанто-движения. Эсперантисты Хемница. Перевёл с немецкого

Г.Короткевич // Информационный бюллетень, 1983/4 (31), с.11-12;

Страница переводчика. На трёх из восьмидесяти трёх... Г.Короткевич // Информационный бюллетень, 1983/10-11 (37-38), с.35-37;

Семинар незрячих эсперантистов РСФСР. 11.07.1985. В.Седов, Г.Короткевич //

Информационный бюллетень, апрель-май 1986/1-2 (55-56), с.12-14;

Ерошенковские вечера. 19.01.1990. Г.Короткевич // *Informbulteno*, 1990/2 (75), с.34-36.

Pri li:

Georgij Korotkevič – 70-jara // *Der Esperantist*, 1986/6 (140), p.142.

Korolevič, Aleksandr Iosifovič (09.02.1913, Lvov—21.11.1995, Lvov, Ukrainio). Ukrainia kaj sovetia sciencisto-matematikisto. Prof. E-instruisto, klubestro, komisionano pri renovigo de la E-movado en 1964. Naskiĝis en familio de grek-katolika pastro. Lernis en Lvova Politeknika Instituto, kiun finis en la 1940 (inĝeniero pri vojoj kaj pontoj). Partoprenis en la 2-a mondmilito.



Ekde la 1948, kiam en Lvov estis fondita Arbararteknika Instituto, Korolevič laboris en ĝi kiel instruisto pri geodezio, poste — pri desegnado. En la 1953 li defendis kandidatan disertacion kaj plue laboris jam kiel docento kaj profesoro (ekde 1973). Dum sia vivo Korolevič verkis kaj publikigis pli ol 40 diversajn sciencajn kaj metodikajn librojn.

Pri Esperanto Korolevič ekinteresiĝis, laborinte en Ternopil en la 30-aj jaroj (li lernis tie en mezlernejo). Kiam en la 1957 fama en Galicio esperantisto Anatolij Koĥ organizis E-kurson, Korolevič finis ĝin kaj tuj komencis instrui la lingvon por komencantoj.


En la 1974 ĉe Lvova Domo de sciencistoj estis fondita E-klubo *Primavero* (fakte de 1958 en la Domo de sciencistoj jam estis funkcia E-kolektivo kiel sekcio, subgvdo de A. Koĥ, sed post ties morto en la 1964 la sekcio ĉesis ekzisti), kiun Korolevič gvidis ĝis sia morto. Estis interesa la vastplana laboro de la klubo. En ĝi estis funkciaj la sekcioj: MEM, inform-propaganda, scienca, instru-metodika, historia (pri E-movado), literatura, muzik-drama, turista, geografia.

Korolevič estis estrarano de ASE en la 1979-89 (en 1979-82 – prezidiano). Tuj post la fonda de URFilio de ASE (ekde 1980) Korolevič gvidis en ĝi instru-metodikajn laboron (ĝis 1983), poste estis gvidanto-organizanto de jubileaj aranĝoj dediĉe al la 100-jariĝo de Esperanto.

Korolevič multe okupiĝis pri literatura agado — tradukis en Esperanton poeziaĵojn el Taras Ŝevĉenko, Ivan Franko, Rasul Gamzatov k.a. poetoj. En 1989 en Kievo estis eldonita ampleksa *Libro pri Esperanto*, kiun oni sufiĉe ofte uzis ankaŭ kiel lernilon. Kelkfoje Korolevič partoprenis internaciajn E-aranĝojn: en Bulgario (1976, 1978), Stokholmo (1980), Ĉeĥoslovakio (1984), Hungario (1989). Ekde 1981 Korolevič estis membro-subtenanto de Internacia E-muzeo en Vieno.

Bibliografio:

Korolevič A. *Esperanto-ukraina konversacilibro*. Ternopol, 1993;



Королевич А. *Книга об эсперанто*. Киев: Наукова Думка, 1989, 254 p., 20 000 ekz.;
Korolevič A. *Книга apie esperanto*. (Libro pri Esperanto). El la rusa tr. Inga Mataitytė. Vilnius:
Eldona Instituto pri Sciencaj kaj Enciklopediaj Libroj, 2004, 223 p., 1 500 ekz.



Kossoj, Abel Berkovič (post la milito **Abram Borisovič**) (30.07.1908, u. Sosnica, Ĉernigova reg.—1976?, Lenigrado). Membro de SEU de 1931. Partoprenis en la 2-a mondmilito kiel kapitano de medicina servo. Estis dekorita per la medalo *Pro la kuraĝo* (11.11.1942), la ordeno *Ruĝa Stelo* (1943), ordeno de *La Patrolanda milito* de la 2-a grado (1945), medalo *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*, medalo *Pro la kapto de Budapeŝto*.

Aktivis en Leningrado en 1957-58 jaroj.



Krajnov Sergej Nikolajevič (ruse – Крайнов Сергей Николаевич, 25.09.1904 – 1991). Partoprenis la militon en la 1941-45, finis ĝin en la rango de ĉefserĝento. Estis distingita per ordeno *Ruĝa stelo* (04.1945) kaj medaloj. Agronomo-hortikulturisto, aŭtoro de 36 sciencaj verkoj. Estis ASE-estrarano, multjara vic- kaj fakdelegito kaj dumviva membro de UEA. Partoprenis kelkajn UK-ojn, plurfoje prelegis en Internacia Kongresa Universitato pri sia fako – agronomio kaj propagandis utilecon de hipofeo.

N. Gudskov

Kudrjavičij, Izrail Grigorjevič (24.06.1910, Dnepropetrovsk—17.04.1978).

Esperantisto ekde 1926. Dumviva membro kaj antaŭe peranto kaj vicdelegito de UEA en Moskvo.

Militservis ekde la 21.10.1931 ĝis la 23.03.1954, ekde 1938 kiel serĝento de la sekureca servo. Partoprenis en la 2-a mondmilito. Estis dekorita per la medaloj *Pro la defendo de Sebastopolo*, *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*.



Kulikov Vsevolod Vasiljevič (ruse – Куликов Всеволод Васильевич, 22.04.1917, Ŝadrinsko - 26.02.1990, Omsko). Ellernis Esperanton fine de 1930-aj jaroj dum studado en Instruista instituto (kiu preparis elementlernejajn instruistojn) de sia instruisto pri matematiko Romuald Iosifovič Sikorskij.

Al la milito iris kiel volontulo, batalis en la 364-a Tosna Ruĝstandarda pafista divizio en la Nord-okcidenta fronto kiel telekomunikisto. Finis la militservon en Berlino en la rango de ĉefserĝento. Ricevis medalon “*Pro batalmeritoj*” (1942) ordenojn “*Ruĝa stelo*” (1943), “*Gloro de la 3-a grado*” (1944) “*Porpatria milito de la 2-*

a grado” (1945), medalojn pro defendo de Leningrado, liberigo de Varsovio, preno de Berlino.

Post la milito revenis en Omskon, kie studis matematikon (1946-59) kaj poste laboris en Omska pedagogia instituto. Tie li instruis matematkon kaj lingvojn de programado, i.a. estis tie la unua instruisto pri programado. En 1950-aj-60aj jaroj estris fakultaton de fiziko kaj matematiko. En 1958 verkis helplibron por instruistoj pri logaritma glitkalkulilo. En 1970-aj ellernis Go-ludon, kaj gvidis la omskan klubon de Go-ŝatantoj, juĝis gravajn Go-konkurojn.

En 1960-70-aj jaroj Kulikov aktive partoprenis en Esperanto-movado – gvidis en sia instituto Esperanto-kursojn, en 1970-aj jaroj estis prezidanto de la Esperanto-klubo “Kamomilo”, partoprenis plurajn SEJT-ojn kaj BET-ojn, kie gvidis Go-ludojn, prelegis pri pac-movado, ktp.

Li havis 5 infanojn, lia filo Vsevolod Vsevolodoviĉ Kulikov estis eminenta ekonomikisto. Neniu el liaj infanoj parolis Esperanton. El liaj multaj genepoj du (Olga Kuzmenko, nun literaturologo en Peterburgo, kaj Ilja Paŝcenko, nun ekonomikisto en Omsko), kiuj loĝis kune kun li, fariĝis denaskaj esperantistoj.

N. Gudskov

Kuznecov, Nikolaj (ĝis 1931 Nikanor) **Ivanoviĉ** (27.07.1911, vil. Zirjanka, Perma gubernio — 09.03.1944, vil. Boratin, Lvova regiono). Sovetia skolto kaj partizano. Heroo de Soveta Unio (1944). Esperantistiĝis en la 1925. Havis 6-7 pseŭdonimojn: “Skolopo”, “Scienculo”, “Koloniano” k.c.



Naskiĝis en kamparana familio. Kiam en la 1925 Kuznecov estis lernanto de la sepa klaso, Sergej Suetin organizis en vilaĝo Talica por lernejoj kaj studentoj de forsta teknikumo Esperanto-rondeton kiun vizitis Nikolaj. En la 1926 Kuznecov fininte lernejon studas en agronomia kurso de Tjumena Agrikultura teknikumo. Post jaro pro morto de la patro ĉesis studi. En la 1926 en Tjumeno sub gvido de Georgij Besedniĥ estis fondita Esperanto-rondeto kiun Kuznecov vizitis. La Esperanto-rondeton gvidis jurkonsilisto de Tjumena rivernaviga kompanio G. Besedniĥ. Kuznecov tre rapide amikiĝis kun tjumenaj esperantistoj, legis librojn en la kluba biblioteko, kie li trovis jam konatajn al si el la kurso de Suetin klasikajn lernolibrojn de T. Cart kaj

E. Peltier, kaj laŭ la rememoroj de Georgij Besedniĥ bablis en Esperanto senĝene kaj rapide kiel en la patrolingvo. Li tre progresis en la lernado de Esperanto, fariĝis lingva helpanto de la kursestro, kaj dum unu el la klubkunvenoj la junulo mirigis la ĉestantojn voĉleginte al ili propran tradukon de sia plej ŝatata poemo de la rusa poeto Miĥail Lermontov *Borodino*. En Tjumeno Kuznecov fariĝis membro de SEU ricevinte membrokarton kun la numero 47001. Kuznecov post kelkaj jaroj posedis lingvojn Esperanton, polan, ukrainan, komian kaj germanan (laŭ germana identiga flugfolio li posedis la germanan kun 6 dialektoj).

En la 1929 Kuznecov estas eksigita el komsomolo kaj teknikumo, ĉar en biografio li ne menciis pri la patra klasa origino. En la 1930 Kuznecov laboras en forsta brigado en urbo Kudimkaro.

La 04.06.1932 sekureca servo arestas Kuznecov-on, la 17.11.1932 kondamnas “pro neglekto” por unu jaro da punlaboro, sed laŭ propono de la sekureca servo li konsentas kunlabori utile al la servo kaj samtage estis liberigita. En la 1932-36 Kuznecov studas malĉeeste en Sverdlovskia Industria Instituto, daŭrigante perfektigi en la germana.

Printempe 1938 Kuznecov laboris en Komia respubliko kiel forstisto. Samjare por ekgvidi Komian respublikan sekurecservon el Leningrado venis Miĥail Ĵuravlev al kiu oni rekomendis Kuznecov-on kiel kapablan, perspektivan personon kiu perfekte posedas la germanan lingvon. Laŭ rekomendo de M. Ĵuravlev Kuznecov estis sendita al Moskvo kie li laboras utile al la servo kiel inĝeniero Rudolf Ŝmidt en aviadilfabriko N-ro 22. En la 1930-aj en Sovetio multe laboris teknikaj fakuloj kaj inĝenieroj el Germanio, Usono k.c. landoj. Kuznecov estas en diplomata kaj monduma medioj konata kiel persono, kiu povas prezenti malfacile haveblan varon. Dank’ al kontaktoj kun germanoj Kuznecov praktikis la germanan kaj havigis utilajn rilatojn kaj personojn.

Post la komenco de la Granda Patrolanda milito Kuznecov kelkfoje sendis peticiojn por esti mobilizita al la fronto. En iu peticio septembre 1941 li skribas: “Dum lastaj tri jaroj, krom eta paŭzo, mi estis en eksterlando, traveturinte ĉiujn landojn de Eŭropo, ricepe atente esploris Germanion”. Pri li oni ne forgesis kaj sendas al Centra aparato de sekureca servo al fako “T” – do, terorismo.

Vintre de la 1942 en militkaptitejo por germanaj trupoj ĉe Krasnogorsko Kuznecov asimilas la oficirajn kaj soldatajn manierojn kaj slangon. Printempe de la 1942 Kuznecov estis sendita al partizana taĉmento *Venkantoj* sub gvido de D. Medvedev kiu agadis en Okcidenta Ukrainio. Aŭtune de la 1942 Kuznecov aperis en Rovno kiel ĉefleŭtenanto Paŭl Siebert. En la 1943 laŭ taskoj de la skoltaj servoj Kuznecov mortigis 11 generalojn kaj altrangulojn de la germana okupacia administraro, kiuj situis en Rovno. En la januaro 1944 Kuznecov ricevas ordonon dum la retiriĝo de la germana armeo veni al urbo Lvovo. Printempe de la 1944 en Lvovo aperis identigaj flugfolioj kun portreto de Kuznecov kiel danĝera teroristo serĉata de kontraŭspiona armea servo. Kuznecov decidis forlasi la urbon por veni al partizana taĉmento kaj transiri la frontlinion. Ĉe vilaĝo Boratin de Lvova regiono la 09.03.1944 Kuznecov kun du kamaradoj en batalo kontraŭ ukrainaj naciistoj eksplodigis la grenadon kaj pereis.

La supozan tombon de Kuznecov oni trovis la 17.09.1959 kaj post identiga laboro laŭ la ostoj kaj kranio la restaĵoj la 27.07.1960 estis reentombigitaj en Lvovo ĉe Monteto de Gloro. La medicinan juĝesploron oni faris laŭ Gerasimov-metodo.

En la 1990-91 en Lvovaj amaskomunikiloj flanke de ukrainaj naciistoj aperis protestoj kaj propono forigi la Kuznecov-monumenton. En la 1992 Kuznecov-monumentoj en Lvovo kaj Rovno estis forigitaj.

Omaĝe al Kuznecov:

La 25.12.1943 Kuznecov ricevis *Lenin-ordenon*; la 29.06.1944 medalon *Partizano de la Patrolanda milito*;

La 05.11.1944 postmorte ricevis titolon *Heroo de Soveta Unio* kaj duan *Lenin-ordenon*;

La 14.10.1999 laŭ ukazo de prezidanto de Ukrainio ordeno *Defendanto de Ukrainio*;

La 17.09.2004 laŭ ukazo de prezidanto de Ukrainio ordeno *60 jaroj da liberigo de Ukrainio for’ de faŝismaj konkerantoj*.

Pri Kuznecov aperis pli ol dudeko da eldonitaj beletraj kaj historiaj verkoj, ankaŭ 7 dokumentaj kaj ludfilmoj kaj 2 spektakloj. La plej konataj filmoj estas:

Подвиг разведчика (Heroaĵo de skolto, 1947);

Сильные духом (Spirite fortikaj homoj, 1967);

Отряд специального назначения (Taĉmento por speciala tasko, 1987);

Гений разведки (Skolta geniulo, 2002);

Последний бой Николая Кузнецова (La lasta batalo de Nikolaj Kuznecov, 2015).

Kuznecov-monumentoj estas en la urboj Jekaterinburgo, Tjumeno, Ĉelabinsko, Talica, Kudimkaro.

Kuznecov-nomon portis 17 lernejoj, pli ol 100 pioniraj taĉmentoj en Sovetio, en pli ol 600 lernejoj estis murstandoj dediĉitaj al Kuznecov. Memortabuloj dediĉitaj al Kuznecov estas en Moskvo, Jekaterinburgo, en vil. Mendelejevo (reg. Perma). Malgranda planedo № 2233 portas lian nomon. En Pamiro estas Kuznecov-montopinto. En kelkaj urboj de Rusio estas Kuznecov-stratoj kaj muzeoj.

Pri Kuznecov:

Sokolovskij R.N. *Ankoraŭfoje pri Esperanto // Tjumenskaja pravda* (Tjumena vero), la 20.10.1967; Ключков В., Строителев И. *Эсперантист Николай Кузнецов // Уральский следопыт*, 1981, № 12;

Opletajev V. *Fremdaj lingvoj en la vivo de Nikolaj Kuznecov // REGo*, 2010/2(57), p. 5-9.

Lobačov, Aleksej Andrejeviĉ (1903 — 29.05.1964, Moskvo). Adoptita filo en vilaĝana familio de vilaĝo Zonino, Kaluga gubernio. General-majoro (1942). En Ruĝa armeo ekde la 1919, en 1920 en komunista partio. En la 1923 li finis la 1-an Unuigitan lernejon de komandantaro. En sia libro *Per malfacilaj vojoj* (1960, 336 p.) Lobačov rememoras sian lernadon en la Sverdlov-Akademio: “Mi korespondis kun kursanoj de germana marksista laborista lernejo. Ni korespondis en la germana kaj Esperanta lingvoj. (La arta internacia lingvo tiam estis sufiĉe vaste disvastigita en Sovetio, ekzistis eĉ CK de SEU, en kiu mi reprezentis universitatan sektion). La leteroj de eksterlandaj amikoj estis publikigataj en ĵurnalo *Sverdlovija*. Jen estas unu el tiuj leteroj, aperinta la 28-an de majo 1932: «Nia lernejo, – skribis kursanoj de la berlina marksista laborista lernejo, – estas fondita en la 1926/27 lernoĵaro, kaj ĉiujare kvanto da studentoj kreskas. En la 1931/32 lernoĵaro ĉe ni studas preskaŭ 8000 studentoj. La lernejo estas la sola altlernejo de la komunista partio kaj havas 30 filiojn en Hamburgo, Lipsiko, Breslaŭ kaj aliaj grandaj urboj de Germanio. La lecionoj oni instruis vespere en 28 distriktaj lernejoj, en ĉiuj ĉefkvartaloj de la Granda Berlino. Ni sendas al vi unu ekzempleron de nia lernoprogramo por la 1931/32 lernoĵaro ankaŭ po 1 ekz. de la lerneja gazeto *Marksist*».

En la 1938 Lobačov finas la Milit-Politikan Sverdlov-Akademion. Ekde februaro 1939 Lobačov estas estro de politika administrejo de Moskva armea arondismento. La 2-an mondmiliton Lobačov renkontis kiel armea konsiliano de la 16-a armeo. Estis vundita. La 19.11.1942 servas en la Armea konsilio de la 20-a armeo. Post la milito Lobačov militservas en la Orient-Siberia arondismento kiel Armea konsiliano. Lobačov mortis la 29.05.1964 en Moskvo.



Lobačov estis distingita je *Ordeno Ruĝa Standardo* (1944), *Ordeno de la Patrolanda milito de la I-a grado* (1944), *Kutuzov-Ordeno de la I-a grado* (1945).

Maĥover, Veniamin Zinovjeviĉ (31.05.1885, Mogiljov,–?). Naskiĝis en familio de oficistoj. Ricevis superan medicinan kleron. Loĝis en historia distrikto de Arĥangelsko – sur insulo Solombala. Antaŭ sia aresto laboris kiel apotekestro.



En la 1917 Maĥover laŭ rajtigilo de *Unio de urboj* vojaĝis al Persio. Revenis Rusion en 1918, loĝis en Mogiljov. En la 1925 translokiĝis al Vologdo kie laboris farmaciisto, en 1927 venis Arĥangelskon. Maĥover kontribuis al medicinaj revuoj eldonataj en Belgio kaj Hungario.

La 17.02.1938 li estas arestita pro la membreco en kontraŭrevolucia organizaĵo. En sia petskribo Maĥover pledis ke li renkontiĝis kun la personoj nur pro profesiaj bezonoj, la kontraŭrevolucian agadon ne subtenis, ke la tutan vivon li dediĉas al medicino, estis inventisto, ke “dum 25 da jaroj laboris por perfektigi lingvon Esperanto”. La 08.04.1939 Maĥover estas rehabilitita kaj liberigita. Maĥover havis familion: edzino Ida Borisovna Maĥover; filo Zinovij (nask. 1923); filino Berta (nask. 1921).

Maĥover partoprenis en la 2-a mondmilito ekde 02.11.1939. Li estis dekorita per la medaloj *Pro la militaj meritoj*, *Pro la defendo de Leningrado*, *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*, ordeno *Ruĝa Stelo*.

Verko:

Maĥover V. (SAT-ano 10405, Arĥangelsk). *Dek jaroj de Popola Komisario por Sankonservado en Sovetio*. El *Medicina Gazeto*, N-ro 19, 1929, Leningrad. Tr. farmaciisto V. Maĥover // *Sennaciulo*, 21.03.1929/233, p.219.

Medvedev, Ivan Jerofejeviĉ (08.05.1924, vil. Kujeĉi, Altaja reg.—09.05.2009, vil. Tjumencevo, Altaja reg.). Fine de 1930-aj ellernis Esperanton ĉe fama instruisto Porfirij Kazanskij, kiu havis abundan korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj. La 27.11.1941 Medvedev estis arestita “pro la fondo de infanajunulara kontraŭrevolucia, terorisma organizaĵo” – do, E-rondeto, kaj 7 monatojn li pasigis en malliberejo. Post esploro de lia “krimafero” oni ne trovis la krimon kaj la 04.07.1942 liberigis lin. Post la liberigo Medvedev partoprenis en la 2-a mondmilito ekde 18.08.1942. Pro militaj agoj ricevis Ordenon *Ruĝa Stelo*; medalon *Pro kuraĝo*, medalon *Pro venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*; ordenon de *La Patrolanda milito de 2-a grado* (06.04.1985). Post la milito instruis fizikon en vilaĝa lernejo kaj dum multaj jaroj gvidis teknikan kino-foto rondeton en Domo de pioniroj



En 1948 edziĝis al Maria Mitrofanovna Korneva kaj havigis 3 filojn.

Pri li:

Дарья Иост. *Нелёгкая судьба Медведёва*. (2020). https://vk.com/@-193315074-nelegkaya-sudba-medvedeva?ref=group_block

Medvedeva, Serafima Nikolajevna (05.02.1911, Sankt-Peterburgo—1982, Leningrado). Partoprenis en la 2-a mondmilito ekde la 15.09.1941 kaj estis dekorita per la ordeno de *La Patrolanda Milito* de la 2-a grado (06.04.1985). En 1970-aj jaroj instruis Esperanton ĉe Leningrada Ĉefpoŝtejo.

Miĥajlov, Sergej Sergejeviĉ (1912—1984). Doktoro pri ekonomiaj sciencoj. Sovetia ambasadoro, diplomato, profesoro. Diskrecia kaj Eksterordinara Ambasadoro. Lia profesia kariero:

En 1940-41 la legaciano de Sovetio en Rumanio.

En 1941-45 la 1-a sekretario de ambasadorejo de Sovetio en Turkio.

En 1946-48 vicfakestro pri Eŭropo ĉe Ministerio pri Eksteraj Aferoj de Sovetio.

En 1948-50 agento de la Centra fako ĉe MEA de Sovetio.

En 1950-54 ambasadoreja konsilisto de Sovetio en Italio.

En 1955-60 Ekstera kaj Diskrecia ambasadoro de Sovetio en Urugvajo.

En 1961-65 direktoro de Inst. pri Latinameriko de la Akad. de la Sciencoj.

En 1965-74 Eksterordinara kaj Diskrecia Ambasadoro de Sovetio en Brazilio.

En 1970-75 Eksterordinara kaj Diskrecia Ambasadoro de Sovetio en Gujano kumule.

En 1974-78 agento de la Centra fako ĉe MEA de Sovetio.

Miĥajlov partoprenis en la 2-a mondmilito. Ricevis du ordenojn *Ruĝa Stelo* (03.11.1944, 05.11.1945).

En 1966 prezidanto de Aŭstralia E-Asocio Ralph Lindsay Harry kaj, samtempe, fama diplomato, renkontiĝinte en Brazilio kun Miĥajlov parolis en Esperanto.

Miloĉenko, Boris Ivanoviĉ (23.07.1895, vil. Ŝiloviĉi, Ĉernigova gub.—14.01.1966, Leningrado). Instruisto, pedagogo, aktoro. En 1927-28 instruas E-n.

Lia patro instruistis en vilaĝa lernejo apud Neĵin. Boris ricevis hejman kleron ĝis 1905 kaj poste studis en gimnazio kiun finis en la 1913. En la 1915 li ricevis ateston de instruisto. En la 1922 li ricevis diplomon de Neĵina Instituto pri Popola Klerigado. En la 1921-30 instruis historion en lernejoj de Neĵin.

En la 1925 Miloĉenko aranĝis en Neĵin amatoran teatron de juna spektantaro en kiu li agis samtempe kiel aktoro kaj reĝisoro. En la 1928 la amatora teatro estis reorganizita al pupteatro. En 1930 Miloĉenko plene dediĉis sin al teatro.

Ekde la 1932 Miloĉenko loĝis kaj laboris en Leningrado. En la 1932-41 instruis, lektiis kaj estris porinfanajn pupredojn.

N-ro 2 (1429)

FONDITA EN 1920

Du Ambasadoroj parolas Esperanton

Fine de novembro 1966 la Ambasadoro de Aŭstralio en Belgujo, S-ro Ralph Harry, vizitis Rio de Janeiro en Brazilo. Pere de antaŭa membro de la Esperanto-Klubo de Kanbero, S-ro Charles Lee, kiu estas konsilanto en la aŭstralia ambasadorejo en Brazilo, li kontaktis kun la Ambasadoro de Sovetunio, D-ro Prof. Sergej S. Miĥajlov, kaj proponis samideanan renkontiĝon.



Ambasadoro Miĥajlov (dekstre) invitis sian aŭstralian kolegon ĉeesti festeton en la ambasadorejo. La brazilia Ministro pri Eksterlandaj Aferoj, S-ro Juracy Magalhaes, ankaŭ ĉeestis.

La du ambasadoroj salutis sin reĉproke kaj parolis dum kelkaj minutoj en Esperanto. Tiam ili informis la Ministron pri la progreso de la internacia lingvo, kies utilo por kontaktoj inter diplomatoj estis evidenta.

Miloĉenko kiel volontulo partoprenis en la 2-a mondmilito ekde la 03.07.1941. Dum la milito li estis dufoje serioze vundita. Dum la lastaj jaroj de la milito Miloĉenko servis kiel tradukisto en barakaroj de la militkaptitoj. Li povis kompreni kaj paroli en la lingvoj: angla, germana, greka, latina, ukraina, pola, latva, itala, hispana, estona kaj finna.

Pro la militaj agoj Miloĉenko ricevis ordenon *La Gloro* de la 3-a grado (1944), medalon *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945* kaj medalon pro *La Defendo de Leningrado*.

Post la milito li revenas Leningradon. En 1946-51 Miloĉenko laboris en Leningradaj teatroj kiel pupisto kaj aktoro. La 07.04.1951 li estis eksoficigita.

En la 1957 li instruis Esperanton en Leningrada Ŝtata Universitato.



Mostovskoj, Georgij Nikolajevič (21.01.1905, Sankt-Peterburgo—1981). Esperantiĝis en la 1928.

Partoprenis en la 2-a mondmilito. Estis dekorita per medaloj *Pro la defendo de Leningrado*, *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945* kaj ordeno *Ruĝa Stelo*. En 1964-73 lekciiis por leningradaj esperantistoj.

Munak, Arnold Adolfoviĉ (04.03.1910—22.06.1976). Pärnuano. Esperantiĝis en 1930, unu el la plej aktivaj propagandantoj kaj instruantoj en la urbo kaj distrikto Pärnu, estrarano kaj prezidanto de Pärnu E-Societo en 1937-39, aktivulo de la loka laborista E-klubo; ekde 1939 translokiĝis kaj aktivis en Kuressaare.

Partoprenis en la 2-a mondmilito ekde la 08.01.1942. Ricevis du medalojn *Pro la militaj meritoj* (16.01.1943; 17.09.1944), medalon *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*. En 1956 Munak fariĝis unu el la plej aktivaj revivigantoj de Esperanto en Pärnu kaj diversloke en Estonio, verkisto de gazetartikoloj kaj preleganto.

Bibliografio:

“Esperanto – rahvusvahelise kultuurilise läbikäimise tähtis tegur. Toõrahva Elu, Võru, 1956/71, 14.06.1956;

Esperanto – rahvusvaheline keel. Kommunaar, Abja, 24.06.1956;

Esperanto – tähtis kultuuriline tegur. Kolhoosi Tec. 14.07.1956, n-ro 84, Kilingi-Nõmme;

Rahvusvaheline keel Esperanto. Kolhoosi Tee, Kilingi- Nõmme, 22.09.1956, n-ro 114.

J. Ojalo



Novik, Sergej Mihailoviĉ (uzis ĉ. 9 pseŭdonimojn: Малады Дзядок; Sary Dziadok; Сергей Пяюн; Сергей Новик-Пяюн, Krasnoludek k.c.) (27.08.1906, vil. Leonoviĉi, Minska gub., — 26.08.1994, Minsko). Esperantistiĝis en la 1922. Belorusa poeto, prozisto, dramaturgo, eldonanto, sociaganto. Membro de Unioj de Verkistoj de Belorusio kaj de Sovetio (1984).

Naskiĝis en vilaĝana familio. En la 1918-24 studis en

Nesviĵa gimnazio, kie partoprenis en skoltismo; en la 1925-26 studis kursojn de instruistoj en Vilno.

En la 1925 en *Studenta penso* aperis lia unua poemo. Novik kontribuis por belorusaj gazetoj kaj ĵurnaloj per siaj poemoj. En la 1926 Novik fondis en sia vilaĝo amatorajn koruson kaj teatron ankaŭ bibliotekon. Pro la kleriga-kultura agado Novik en la 1926-31 estis ekzilita de la polaj potencoj. En la 1927-31 kontribuis al porinfana gazeto en Vilno.

Reveninte al sia naskiĝregiono li denove estis arestita kaj ekzilita al Slonim. Kun sia edzino Ludmila en la 1938-39 eldonis pollingvan *Gazeta Slonimska*, ĉar eldoni en la belorusa estis malpermesite.

En marto de la 1939 Novik estas arestita kaj troviĝis en malliberejo en urbo Baranoviĉi ĝis septembro, kiam tien venis la Ruĝa armeo. En la 1939-40 Novik laboris kiel inspektisto pri la popola klerigado de Slonima regiono. En la 1940-41 Novik estis direktoro de regionesplora muzeo.

Dum la 2-a mondmilito subtenis kontaktojn kun partizanoj. Pro la kontaktoj li en 1943 estas arestita kaj deportita al koncentrejo Koldiĉevo. La 04.07.1944 dum la pafekzekuto de la 600-persona grupo, estante vundita, li ŝajnis sin morta kaj saviĝis. Post liberigo de Slonim li direktoris en regionesplora muzeo. La 14.12.1944 la sovetia sekureca servo lin arestis kaj la 24.03.1945 kondamnis al 10 jaroj “pro la perfido de la patrio” kaj ekzilis al Kolyma. Novik estis liberigita kaj rehabilitita la 18.12.1958. Li instruis Esperanton eĉ dum sia ekzilo en Jakutio.

En 1959 Novik revenis al Belorusio; loĝis en Slonim, Nesviĵ kaj ekde 1960 en Minsko.

Novik estas aŭtoro de la versokolektoj *Ĉiam kun kanto* (1984) kaj porinfana *Steloj helaj* (1986); *Kantoj el malliberejo* (1993). Li verkis en la lingvoj belorusa, pola, rusa kaj Esperanto.



Ojalo, Jaan Hansoviĉ (18.02.1914, Vana-Tänassilma, Viljandimaa — 12.02.2004). Filo de estona kampulo-arbargardisto, lernis en la loka 3-klasa lernejo “Oiu”, poste en Viljandi, kie finis gimnazion (1932); militservis 1932-34, laboris en la naskiĝloko kiel kampulo-arbargardisto 1934-38, lernis en kooperativ-komerca lernejo; laboris vendisto 1939-40, poste kontoristo en konsum-kooperativa centro 1940-41 en Tallinn. Li estis mobilizita en la Ruĝarmeon en julio 1941, de kie liberiĝis en 1945. En la 1946-74 Ojalo okupis kelkajn postenojn en la konsum-kooperativa sistemo. Li studis distance ekonomikon en Politeknika Instituto de Tallinn, diplomiĝis en 1955 kiel ekonomikisto ĉe la Tartua Universitato; emeritiĝis en la 1974.

Ojalo lernis Esperanton en la 1929 este gimnazia lernanto, agadis en Esperanto-rondo de gelernantoj, partoprenis fondon de la Esperanto-societo *Ondo* (1932). Dum li laboris kampare ekde 1933, Esperanto-agado de Ojalo malintensiĝis, kaj ekde 1940 ĝis 1956 ĉesis. En 1956 Ojalo denove ekaktivis en la renaskiĝanta movado en Tallinn kiel klubestro de Tallina Esperanto-Klubo en la kleriglaborista sindikato, ekde 1969 sekretario de Esperanto-

komisiono de Amikeco-societo. En la 1976-a Ojalo ekzamenigis pri Esperanto ĉe prof. P. Ariste en la Tartua Universitato. En 1980 li estis elektita sekretario de Estona filio de ASE, ekde 1988 sekretario de Eesperanto-Asocio de Estonio. En 1992-95 Ojalo estis prezidanto de EAE; ekde la 1991 honora membro de UEA, ekde 1995 honora membro de EAE.

Ojalo gvidis Esperanto-kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj, verkis Esperanto- kaj estonlingvajn artikolojn pri la movado kaj interlingvistiko por estonaj gazetoj kaj internaciaj Esperanto-gazetoj, daŭrigis la bibliografion de la estona literaturo en Esperanto komencitan de H. Sakarija kaj Hilda Dresen kaj fondis la Esperanto-arkivon de la Estona Esperanto-movado.

Ojalo estas aŭtoro de Esperanto-lernolibroj por estonoj aperintaj en la 1973, 1986, 1995, ankaŭ de *Estona-Esperanta vortaro* 1989, 1999. Ojalo tradukis kelkajn verkojn de estonaj klasikuloj en Esperanton.

Bibliografio:

Esperanto keele ĉpik. Tallinn, 1975, 136 p., 35 000 ekz.;

Ojalo J. *Interlingvistiko en Estonio // Amikeco*, 1981/38, p.16-20; (fino) № 39, p.15-17;

Esperanto keele ĉpik. 2-a eld. 1986, 182 p., 20 000 ekz.;

Esperanto keele ĉpik. 3-a eld. 1995, 198 p., 1000 ekz.;

“Esperanto keele iseĉppijaile ja lisamaterjal 8-11. klassi fakultatiivkursusele” (kun B.Kolker). ENSV Haridusministeerium 1984, 102 p.;

“Ni daŭrigu...” lernolibro por daŭrigaj kursoj. Kaŭnas, 1986, 500 ekz., 64 p.;

“Eesti-Esperanto sōnastik” por lernejoj. Kleriga Komitato de ESSR, Tallinn, 1989, 80 p., 3 000 ekz.;

Ojalo J. *Estona literaturo en Esperanto // Interlinguistica Tartuensis*. Vol. VI, Tartu, 1989, p.165-168;

Ojalo J. *Esperantaj sinonimoj*. UEA kaj Fundacion Esperanto-o, 1993, 96 p., 3-a eld. 1999;

“Eesti-Esperanto sōnastik”. Eld. EAE, 1999, 320 p.;

Tradukoj:

Beekman V. *Lumo de Orienta Eŭropo*, Tallinn, 1978, 48 p. (kun H.Dresen, H.Saha);

Vaarandi D. *Ventolume*, poezio, Tallinn, 1986, 140 p. (kun H.Dresen, S.Kärner);

Kiik H. *Maria en Siberio*, romano. Manuskripto;

Beekman V. *Noktaj aviadistoj*, romano, Tallinn, 1989.

Pri li:

Enciklopedio pri la Estona Esperanto-movado. Tallinn, 2000, p.55-56;


Ojalo J. *Mi demandas... kaj respondas // Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*, 1989/2;

Kaljusaar A. *Monumento al Jaan // Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*, 2004/2;

Jaan Ojalo (1914-2004) // LOdE, 2004/3(113), p.15 (Nekr.);

NDK, p.218-219.

Pan, Jakov Solomonoviĉ (pseŭdonimo I. Neĉajev) (1906, Berdiĉev,–1941, ĉe Seliger-lago). Naskiĝis en familio de oficisto. La familio vegetis en akra malriĉeco. El 18 geinfanoj elvivis nur 10. Gepatroj de Pan mortis frue kaj multnombraj parencoj adoptis la infanojn al siaj familioj. Jakov ricevis kleron en orfejo, sed brilan. Estante 14-jara, Jakov la 14.07.1921 skribas leteron al Popolkomisaro pri Klerigado Anatolo Lunaĉarskij mem, en kiu li petis lin helpi por transloĝiĝi Moskvon kaj daŭrigi kleriĝon.





En la letero Jakov menciis pri la posedataj lingvoj: "...Mi bone posedas jidan kaj rusan lingvojn. Iom posedas Esperanton, hebrean, ukrainan, francan kaj germanan lingvojn". Tre mirakle, sed la Popolkomisarano ne nur respondis, sed helpis al li. Post unu jaro Jakov jam instruis en Laborista fakultato kiun ĵus finis mem. Pan daŭrigis sian klerigon kaj finis kemian fakultaton de Baŭman Supera teknika lernejo en Moskvo. Poste li komencas labori en Karpov Kemia Instituto. En la sama periodo Pan komencas publikigi scienc-popularajn artikolojn en ĵurnaloj kaj gazetoj: *Tekniko*, *Scio estas Forto*, *La Teknikon al la junularo* k.c. La nova pasio igas lin plene dediĉi sin al ĵurnalista profesio. Unue Pan kuneltondis ĵurnalon *Por industriigado*, poste laboris en redakcio de la gazeto *Scio estas Forto*, kie baldaŭ okupis lokon de la scienca redaktoro.

Publikigitaj en la 1934-36 en revuoj *Scio estas Forto* kaj *La Teknikon al la junularo* scienc-popularaj artikoloj estis bazo por la unua libro de la juna verkisto, kiun li nomis *Rakontoj pri elementoj* (1940). Lia dua scienc-populara libro *Kemia armilaro* (1942), rakontanta pri venenaj substancoj, aperis jam post morto de la aŭtoro. Dum la 2-a mondmilito liaj libroj *Kemia armilaro* kaj *Blanka materio* (1943) estis tradukitaj en armenan lingvon kaj eldonitaj en Erevano en la 1943 kaj 1945. Sed la plej grandan sukceson havis lia unua libro *Rakontoj pri elementoj*, kia havis tri reeldonojn (1940, 1944, 1960). La libron oni komencis traduki jam en 1942 kaj eldoni en diversaj landoj: Usono, Grandbritio, Argentino, Italio, Francio, Ĉinio, Japanio.

Fine de la 1930-aj Pan edziĝis kaj en 1939 li ekhavis filon Viktor. Sed ĉiujn planojn de la ambicia kaj talenta homo rompis la 2-a mondmilito. Li kiel volontulo foriris al la fronto. Aŭtune de 1941 Jakov Pan en rango de leŭtenanto estas rotestro kaj post unu monato li pereis dum la batalo ĉe Seliger-lago.

En literatura arkivo de Pan restis nek finitaj nek eldonitaj manskribaĵoj, rakontoj, noveloj. Fragmento el la arkivo estis publikigita en 1957 en la scienc-populara revuo *Scio estas Forto*.

Pankov, Aleksandr Aleksejeviĉ (29.02.1920, Georgijevsk, Stavropola teritorio, – mortis antaŭ la 2010). Naskiĝis en familio de farmaciisto.

Pankov post la fino de mezlernejo studis en Nigramara supera milit-mara lernejo kiun finis en la 1941. Post la komenco de la 2-a mondmilito Pankov estis mobilizita al la fronto, kie li defendis Nordmaran marbazon Polarnoje, en la 1943 en Karelia fronto li ricevis gravan vundon kaj perdis la kruron.

En la 1945-51 Pankov studis en Stavropola Pedagogia Instituto la anglan lingvon. Dum 21 jaroj li instruis la anglan. Dum 25 jaroj Pankov estras filatelistan klubon. Li, estante kunorganizinto de la societo de libroŝatantoj, estris ĝin. Pankov prelegis pri filatelo kaj literaturo en radio kaj televido.

Pankov ofte ŝanĝis loĝlokojn: urbo Stavropolo, vil. Kurgannaja ĉe urbo Labinsk, vil. Borgustanskaja, ekde 1959 loĝis en urbo Kislovodsko.

Pankov verkis gvidlibron pri Kislovodsko, rememorojn, dekon da noveloj, tri romanojn kaj tradukojn. Entute li verkis 62 artikolojn kaj noticojn. Dum 30 da jaroj Pankov kolektis materialojn pri Vasilij Eroŝenko, pri kiu li verkis dekon da artikoloj

publikigitaj en la gazetaro de Belgoroda regiono kaj Norda Kaŭkazio. Per malnova aŭto *Zaporofec* li traveturis multajn regionojn akirante novajn faktojn, konfirmitajn de atestantoj, kiuj konis Eroŝenko-n. Li estis en la urboj Ĥarkovo, Voronejo, Moskvo, Belgorodo, vilaĝo Obuĥovka. En la 1970-aj jaroj Pankov renkontiĝis kun parencoj de Eroŝenko. Pankov prezentis siajn arkivojn por esploro al la verkistoj Takasugi Itiro, Aleksandr Ĥarkovski, Polakovski.

Pankov tradukis el Esperanto kelkajn verkojn de Eroŝenko, inkluzive ciklon pri Ĉukotko.



Petrjaev, Jevgenij Dmitrijeviĉ (03.03.1913, Berjozovskij, gub. Perma — 05.02.1987, Kirovo). Sciencisto-regionesploristo, militkuracisto, bibliofilo. Aŭtoro de 473 sciencaj verkoj pri biologio, mikrobiologio kaj regionesplorado, kandidato de biologiaj sciencoj, membro de Unio de la verkistoj (1955). Honora civitano de la urbo Nerĉinsk (1972).

Patro: Dmitriĵ Iljiĉ Petrjaev, poŝtlaboristo; patrino: vilaĝa instruistino.

En la 1929 Petrjaev finis sepjaran lernejon, poste studis en Nekrasov-mezlernejo kun medicina specialeco. Li laboris dissekciisto en Bakteriologia Instituto. En 1930 konstruita de li aparato ricevis laŭdon de scienca konsilio de la Instituto. Petrjaev studis en Medicina Instituto, samtempe estis laboratoria helpanto en Instituto de Eksperimenta medicino, poste scienca kunlaboranto en katedro de farmakologio. En 1938 Petrjaev finis la Instituton kun laŭda mencio kaj samjare li estis rekrutita al la armeo. La militservo okazas en Transbajkalia. Li ricevis rangon de militkuracisto de la 3-a grado.

Ekde septembro de la 1938 ĝis oktobro 1940 li estis laboriestro de medicina sanitara baterio de la 36-a motorizita fusilista divizio. En 1939 Petrjaev partoprenis en bataloj ĉe rivero Ĥalkin-Gol. Ekde majo 1940 ĝis septembro 1941 li estas laboriestro de Kjaĥta kaj Ulan-Udea milithospitaloj.

En la 1941-44 Petrjaev estis fakestro de epidemiologia sanitara laboratorio de Transbajkalia armea arondismento.

En la 1944-46 Petrjaev estis supera fakulo de la 304-a epidemiologia laboratorio. En aŭgusto-septembro 1945 li partoprenas en bataloj kontraŭ Japanio. En la 1980-aj jaroj dum iu Esperanto-renkontiĝo de Esperanto-klubo en Kirov Petrjaev rakontis, ke li estis membro de la komisiono pri ricevo de trofeaj aĵoj de la japana armeo en For-Oriento fine de la 1945. La tradukistoj el la japana lingvo estis tre malmultaj. Inter la japanaj militkaptitaj oficiroj Petrjaev trovis esperantiston kaj la plua traduka laboro el la japana en la rusan lingvon pere de Eesperanto estis finita rapide kaj kvalite.

Pro la militservo Petrjaev estas omaĝita per 2 ordenoj *Ruĝa Stelo*, 2 medaloj *Pro la militaj meritoj*, mongola medalo *Bid Jalav* k.m.c.

En la 1947-56 Petrjaev laboris kaj loĝis en Ĉitao. Ekde 1956 li loĝis en la urbo Kirov. En la 1962 Petrjaev iniciatis *Regionesplorajn jaŭdojn* en la Hercen-biblioteko, ankaŭ li partoprenis en preparo de la prelegaroj je la nomoj de Hercen, Saltikov kaj

Grin. En la 1965 li emeritiĝis en rango de kolonelo. Post la pensiigo Petrejaev tute sin dediĉas al la literatura-regionesplora agado.

La privatan bibliotekon de Petrejaev oni konsideras kiel libra monumento de federacia signifo. La kolekto enhavis pli ol 10 000 da unuoj en kronologia stato 1810-1989. La librokolekto estas deponita: en fako de valora literaturo de Kirova regiona Hercen-biblioteko kaj biblioteko de Ŝtata arkivejo de soci-politika historio de Kirova regiono. La kolekto enhavas librojn, broŝurojn kaj gazetarojn kun temoj: literaturscienco, librologio, bibliografio, regionologio, medicino k.c.

Laŭ iniciato de Petrejaev en la 1965 en Ĉitao estis fondita Literatura muzeo de Transbajkaliao. En la urbo estas strata Petrejaev-memortabulo. En la 2011 Rusia poŝto emisiis koverton kun portreto de Petrejaev.

Ekde la 1988 en Kirovo oni praktikas Petrejaev-prelegarojn.

En la 2001 ricevis Petrejaev-nomon: Kirova urba biblioteka filio N 13 kaj vilaĝa Stolbova biblioteko de Slobodskoj distrikto.

Petrejaev-familio: edzino – Aleksandra Nikolajevna Jevsejeva (†1991); filo Jurij (1939), filino Natalia (1946-2000).

Pri li:

Заболотский В. *Петряев Евгений Дмитриевич* // КЛЭ. – М., 1968. Т. 5;

Петряев Евгений Дмитриевич // Литературный Киров. Библиографический словарь писателей Кировской обл. Киров, 1972;

Трушкин В. Е. Д. *Петряев* // Литературная Сибирь. Критико-библиографический словарь писателей Восточной Сибири. Иркутск, 1988. Т. 2.



Piljov (ruse: Пылёв), **Aleksandr Nikolajevič** (10.07.1894, Sveaborg, Finnlando—1978?). Esperantiĝis en 1918. En la 1919-21 estis sekretario kaj prezidanto de la petrograda E-societo *Espero*. Partoprenis en la 2-a mondmilito ekde la 10.01.1941. Ricevis medalojn *Pro la Militaj meritoj*, *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*, ordenon *Ruĝa Stelo*.

Piljov estas aŭtoro de tri E-fotokartetoj (1959), serio de la fotokartetoj “Esperanto servas pacon” (1966).

Pimenov, Vasilij Pimenoviĉ (1885—1968). Esperantisto ekde 1908. Delegito de UEA en Dnepropetrovsk. Partoprenis en la 2-a mondmilito. Ricevis medalon pro la *Defendo de Leningrado* (19.02.1944).

Pisarev, Vladimir Prokofjeviĉ (1906—26.04.1970). Esperantistiĝis en la 1922. En la 1924-30 Pisarev instruis Esperanton en la fabriko *Belgoskino* ankaŭ en uzino *Svetlana*, gvidis Esperanto-sekcion ĉe Kulturdomo de “La unua jarkvino”. En la 1921-26 li estas komitatano de leningrada SEU-filio, en la 1926-38 ano de la tutunia SEU. En la 1931 partoprenis SAT-kongreson en Amsterdamo. En la 1941-46 militservis en la Soveta armeo. Ekde la 1946 ĝis 1970 vivis en Leningrado kaj Kujbiŝevo. Kolektis materialojn pri Esperanto-movado en 1917-39.

Podkaminer, Semjon Naŭmoviĉ (19.01.1901, Tula, – 28.09.1982, Sestrorecko). Naskiĝis en familio de amatora pentristo. Esperantistiĝis en la 1920. Profesoro, komunisto, Honora Aktivulo de SEJM (1976), Honora Membro de UEA (1981).

En la 1913-14 Podkaminer studis en Peterburga vira juda gimnazio de I. G. Ejzenbet. En la 1919 li finis la 4-an Odesan gimnazion. En la 1920 estante studento de Odesa Politeknika Instituto kiel volontulo aliĝis al Ruĝa Armeo. En la 1924 Podkaminer finis Teknika-Pedagogian Instituton. Samjare li abiturientiĝis al Leningrada Politeknika Instituto, kiun finis en la 1929.



Podkaminer dum kelkaj jaroj studis en konservatorio, sed lin logis la tekniko kaj li iĝis fervojoingĝeniero. Poste li dediĉis sin al aviado. Laŭ la profesio Podkaminer ricevis gradon de kandidato de la sciencoj, estis katedrestro en Altlernejo de Civilaviado, kaj poste rektoro de la lernejo.

En la 1921 Podkaminer estas aktiva kunpreparanto de la 3-a Ruslanda (la 1-a Sovetia) Esperanto-Kongreso, okazinta en Petrogrado.

Podkaminer kiel sekretario de loka prepara komitato partoprenas en la 6-a SAT-Kongreso, okazinta en 1926 en Leningrado. En 1928 li partoprenis en la VIII-a SAT-Kongreso en Gotenburgo (Svedio). Antaŭ 1937 Podkaminer okupis diversajn postenojn en SEU: estro de junulara sekcio;

plenumkomitatano de CK de SEU; sekretario de Leningrada filio de SEU.

La 24.12.1936 Podkaminer prezentis al SEU raporton “Pri agado de la Leningrada filio de SEU”. Laŭ la raporto oni konsideris kreskon de la filio: *de 163 membroj en 1934 ĝis 833 en 1936. En la filio estis 35% de komunistoj, 18% de junkomunistoj. En la filio funkciis 18 Esperanto-rondetoj, el kiuj 7 estis fabrika-uzinaj, inkluzive la plej grandajn en “Skoroĥod”, “Svetoĉ”, “Svetlana”. Sukcese funkcias Leningradaj Esperanto-Universitato kaj PEK-filio. Estis viglaj kontaktoj kun turisma firmao “Inturist” dank’ al ĝi estis 29 vizitoj de eksterlandaj esperantistoj. Regule brodkastis esperantlingve Leningrada radio.*



En la 1930-41 Podkaminer instruis en Leningrada Altlernejo de Civilaviado.

Dum la 2-a mondmilito Podkaminer estis mobilizita al Leningrada fronto. En la 1943, estante subkolonelo de Sekureca Servo, estis ĉefo de la 7-a fako pri “speciala propagando” de la fronto. Temas pri propagando inter germanaj militkaptitoj. Podkaminer partoprenis en laboro de la Komitato de “Liberata Germanio” en kiu laboris eksoficiraj de la germana armeo, kiuj deziris komenci novan vivon. En la komitato Podkaminer laboris kun M. Sedevec, Walter Ulbricht, Wilhelm Pik, Alfred Kurella, Wilhelm Florin kaj ceteraj eminentaj konstruantoj de la postmilita socialisma germana

ŝtato. Multaj germanaj oficiroj estis dankaj al Podkaminer pro tio, ke li helpis al ili komenci novan vivon.

Post la milito Podkaminer partoprenis en aranĝo de Unio de Kulturo de GDR. Pro tio kaj pro la meritoj en evoluo de amikaj rilatoj inter la sovetiaj kaj germanaj esperantistoj Kulturbund de GDR distingis lin en la 1975 per la ora medalo de Johannes Beher, kaj en 1979 – per honora signo de Centra Laborista Unio. Kiel eksoficiro, Podkaminer en la 1980 vizitis GDR-on okaze de la 35-jariĝo de la liberigo.

Postmilito Podkaminer estis rimarkinda preleganto en la Asocio *Znanije* (Scio) en Leningrado. En 1956 li instruis Esperanton ĉe la Instituto de Civitana aviado. En la 1957-81 partoprenis en Leningrada Esperanto-movado. En la 1962-79 Podkaminer estis prezidanto de la Leningrada filio ĉe SSOD. Li dum pli ol 20 da jaroj laboris en leningrada regiona Packomitato. Unio de Societoj de Amikeco kelkfoje distingis lin per honoraj gratulfolioj.

En la 1978 en kolektiva verko *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado* aperis du artikoloj de Podkaminer: “Lenin kaj Esperanto” kaj “Socialismo kaj Internacia Lingvo”.

Podkaminer dum multaj jaroj subtenis agadon de sovetiaj esperantistoj en SEJM.

En 1969 li estis unu el ĉefaj organizantoj de la Postkongreso de UK-54, kiu kunvenigis en Leningrado grandan amason da eksterlandaj kaj sovetiaj esperantistoj. Li multe aktivis en MEM (vicprezidanto en la 1972-76), kaj ekde la fondo de ASE en 1979 ĝis sia morto Podkaminer estis vicprezidanto de ASE.

Podkaminer estas aŭtoro de pli ol 50 artikoloj, aperintaj en multaj Esperanto-periodaĵoj. Li partoprenis en la Universalaj Kongresoj en Haago (1964), Tokio (1965), Budapeŝto (1976), Varna (1978).

Sovetia registaro alte taksis lian agadon: li ricevis ordenon de *Patrolanda Milito* de la I-a grado, ankaŭ 3 ordenojn *Ruĝa Stelo*.

Profesoro Podkaminer mortis la 28-an de septembro 1982 kaj estis enterigita en la urbo Sestorecko.

Bibliografio:

Podkaminer S.N. *Lenin kaj Esperanto // Der Esperantist*, 1970/42, p.1-8, 17-20;

Podkaminer S.N. *Oktobra Revolucio kaj Rusia Esperantista Movado // Der Esperantist*, 1978/3(89), p.2-5;

Pri li:

Blanke D. *Profesoro Simeon Naŭmoviĉ Podkaminer – 80-jara // Der Esperantist*, 1980/6, p.1;

Centra Estraro de GDREA. *Forpasis elstara soveta veterano: S.N.Podkaminer // Der Esperantist*, 1982/5(115), p.107;

Informbulteno de ASE, 1982/10-11 (26-27), p.35-36;

Blanke, Detlev. *Rememore pri prof. Simeon Naŭmoviĉ Podkaminer // Der Esperantist*, 1986/4(138), p.75-76;

Koroleviĉ A.I. *Kniga ob Esperanto* (Libro pri Esperanto), Kiev, 1989, p.141-142;

Aroloviĉ V. *Du eminentaj jubileoj. S.Podkaminer, M.F.Paŝĉenko // REGo*, 2001/3(5), p.1;

Dubin A. *Furŝtatskaja ulica*. (Furŝtata strato), Moskvo, 2005, 430 p. (p.83-84);

Krasnikov O., Blanke D. *Эсперанто-движение: фрагменты истории* (Esperanto-movado: fragmentoj el la historio), Moskvo, 2008, 214 p.

Vera Androĥanova (Podkaminer) *Mia avo Semjon Podkaminer*. CkK, 14(83), p. 42-45

Ponĉik, Hackel' Abramoviĉ (13.11.1906, Loĥvica, Poltava gub.—1984?). Leningrada esperantisto. Partoprenis en la 2-a mondmilito ekde la 27.10.1928 ĝis la 19.03.1953 en rango de subkolonelo. La majoro Ponĉik pro la militaj agoj ricevis ordenon de la *Patrolanda milito* de la 1-a grado (06.04.1985), medalon *Pro la militaj meritoj*, *Pro le venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*, ordenon *Ruĝa Stelo*, ordenon *Ruĝa Standardo*.

Robinzonas, Mark Moisejeviĉ (20.08.1897, Lazdijai, Litovio—13.10.1971, Vilnius). Merita medicinisto, kuracisto-venerologo. Fininte gimnazion en 1920 iun tempon instruistis; en 1929 finis Kaŭnas Universitaton, akiris specialecon de kuracisto kaj komencis labori en Kaŭnas, en 1932-40 en Plunge.

Partoprenis en la 2-a mondmilito ekde 16.01.1942 kiel majoro de medicina servo en la Ruĝa armeo. Ricevis ordenon *Ruĝa Stelo* (1943) kaj medalon *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945* (03.06.1946). Post la milito laboris en Vilnius, en la Respublika Inst. de haŭtaj kaj veneraj malsanoj kiel ĉefkuracisto; en 1970 pensiuliĝis.

Esperantiĝis en 1924. Robinzonas estis unu el la plej aŭtoritataj kaj influhavaj esperantistoj en Litovio: li estis honorita per du ordenoj *Ruĝa Stelo*, du honorskriboj de Supera Konsilio, per medaloj. Li ne timis dum Stalina personeckulto porti surbruste verdan E-steleton kaj publike sinteni kiel esperantisto. Li estis neanstataŭebla organizanto de E-aranĝoj en Litovio, ŝirmilo de E-movado. Li fervore laboris por Esperanto en Kaŭnas, Plunge, Vilnius. Robinzonas estis estrarano de Vilna E-klubo, aktiva kaj objektiva komisiano pri praktikado de eldonotaj E-lermolibro. Li ĉeestis Baltan Kongreson en Tallinn en 1940. La ĝenerala kunveno de LitEA 11.06.1939 elektis lin en la estraron kiel revizoron. Jam en Plunge li estis delegito de I.E.L. En BET-oj Robinzonas ĉiam gvidis matenan gimnastikon. Li ŝatis vojaĝi kaj poste rakonti siajn impresojn al esperantistoj.

Post la morto subita pro kormalsano Robonzonas estis sepultita en Vilna juda tombejo en Žvėrynas en la salono de Ministerio pri sanprotektado. Vilna E-klubo organizis la konstantan deĵoron ĉe la mortinto.

A. Mekys, A. Sidorov.

Rogov, Andrej Borisoviĉ (28.04.1914, u. Ĉjornij Ostrov, Kamenec-Podolska reg.—27.10.1978, Ivankovci). Esperantisto ekde la 1927, profesia instruisto. Rogov perfekte sciis la germanan. Partoprenis en la 2-a mondmilito ekde la 15.12.1939. Li estis dekorita



per la medalo *Pro la defendo de Leningrado* (22.07.1943), medalo *Pro la defendo de Moskvo* (01.05.1944), medalo *Pro la defendo de Kaŭkazio*, medalo *Pro la kupto de Kenigsbergo*, medalo *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945* (09.05.1945), ordeno *Ruĝa Stelo* (30.06.1945). Fine de la milito Rogov servis kiel milita urbkomandanto de la 21-a sektoro de Vieno ĝis la 31.12.1946. Reveninte al Ivankovci li estis direktoro de lernejo kaj instruis germanan lingvon. Ekde 1961 instruis Esperanton en Domo de pioniroj de u. Ĥmelnickij. Li opiniis, ke informado pri Esperanto en sovetia gazetaro

estas ne kontentiga kaj komencas mem tajpi *Esperantajn Artikolarojn* en 10 ekz., dissendataj al aktivaj kaj influhavaj esperantistoj. Li gvidis multajn E-kursojn, fondis en urbo Ĥmelnicki E-klubon. Multe verkis, tradukis, redaktis kaj kolektis abundan materialon por eldonota *Ukraina antologio*. Estis rimarkinda figuro en la postmilita sovetia E-movado.

Rogov mortis 27.10.1978 pro la kuracista eraro dum la operacio. Entombigita en Ivankovci.

Pri li:

Mikaelo Bronŝtejn. Andreo Rogov kaj lia neefektiviĝinta revo. CkK, 14 (113), p.46-51

Rublov (ruse: Рублёв), **Sergej Grigorjeviĉ** (14.01.1901, Odeso — 08.07.1979, Odeso). Esperantistiĝis en 1919. En la 1921-29 jaroj Rublov estis gvidanto de Esperanto-movado en Odeso. Rublov estis membro de CK de SEU (1925-28); en 1929 li estas membro de Internacia Lingva Komitato, kie reprezentis Sovetunion.

Rublov finis gimnazian kurson kun ora medalo. Ankoraŭ en gimnazio li ellernis la latinan kaj grekan, perfekte posedis la germanan kaj francan, sciis la anglan, italan kaj hispanan. En la 1929 Rublov komencas labori en fabriko de lakoj kaj farboj, gvidis ties Centran Laboratorion, plenumis multajn esploralaborojn, faris plurajn inventojn, publikigis sciencajn artikolojn. Elstara kemia sciencisto, Rublov post fino de la kemia fakultato de Odesa Universitato en la 1925 ĝis 1976 estis estro de la scienc-esplora laboratorio ĉe la farba fabriko. Li estas aŭtoro de multaj solvoj de sciencaj problemoj, kiuj senpere estis realigataj en produktado. Pro sia granda laboro en 1964 Rublov ricevis honoran titolon *Merita inventisto de Ukraina SSR*.


En la 1923 Rublov prelegis pri Esperanto en la klubo de la kuracista sindikato, ankaŭ en la klubo de Medicina Instituto de Odeso.

En la 1925 Rublov kaj Veniamin Vozdvjenskij gvidis Esperanto-kursojn en mezaj kaj superaj lernejoj.

El siaj vojaĝoj tra Karelio kun akademiano mineralologo A. E. Fersman naskiĝis tradukoj de du ties verkoj: *La vojo al scienco de estonto* kaj *La kemio de universo*. Akademiano A. E. Fersman verkis specialajn antaŭparolojn por ambaŭ Esperanto-eldonaĵoj.

Grandan sukceson havis lia lernolibro *Esperanto-rondeto*, kiu ricevis favoran mencion de la Internacia Pedagogia Instituto (Svislando), kaj sur kies bazo en la 1920-30-aj jaroj estis eldonitaj kelkaj lernolibroj kaj du metodikaj libroj ruse, ukraine, bulgare, germane kaj france. En 1932 la Baŝkiria respublika ŝtata eldonejo havis planon eldoni la lernolibron de Rublov tatar- kaj baŝkiringve. Nur la rusa varianto havis 8 eldonojn kun suma kvanto 110 000 ekzempleroj!

En manuskriproj restis verko *Struktura vortaro*, *Laŭsona vortaro* kaj *Sistema vortaro de Esperanto*. Tamen famo venis al Rublov pro tradukarto kaj tradukado. Rublov tradukis en Esperanton pli ol 600 poeziajn verkojn de multaj rusaj poetoj: Brjusov, Blok, Bunin, Balmont, Jesenin, Ĉeĥov, Puŝkin, Lermontov, Nekrasov, Tjutĉev, Fet, Aleksej Tolstoj, Majakovskij kaj multaj aliaj, pli ol 50 aŭtoroj.



Kun grupo de Odesaj Esperanto-beletristoj Rublov tradukis la romanon de Nikolaj Gogol *Malvivaj animoj*, kies manuskripto estas perdita. Oni povas esperi, ke ĝi iam troviĝos, same kiel troviĝas de tempo al tempo perditaj literaturaj verkoj. Same estis tradukita kaj eldonita libroforme la romano de A. Bogdanov *Ruĝa stelo*. Artikoloj de



Rublov aperis en *La Nova Epoko*, *Sennacieca Revuo*, *Norda Prismo* kaj multaj aliaj.

Rublov kun poetoj V. Sutkovoj kaj V. Ivanov kreis Literatur-Sciencan Rondeton (LoSoRo), kie Vladimir Sutkovoj estis sekretario. Multe da beletraj verkoj estis kreitaj, multe da popular-sciencaj lekcioj prezentitaj de ĝiaj membroj. Multaj homoj memoras aranĝon de grandega Esperanto-ekspozicio en la Urba Domo de Instruistoj (en tiu tempo ĝi nomiĝis

"Domo de klerigo"). Rublov estis pasia gvidanto de grupoj, kiuj venis por konatiĝi, kio estas "la fenomeno Esperanto". La tutan periodon de laboro de la ekspozicio li venadis ĉiutage kaj ĉiam ĉirkaŭ li estis amaso da homoj, inundo da demandoj kaj momenta respondo al ĉiu.

Rublov multe laboris en Odesa Ŝtata Arkivejo kaj kolektis interesajn materialojn pri la historio de Odesa Esperanto-movado. Li verkis biografian novelon pri la fama inventisto de elektrolampo V. Didriĥson (kunlaboranto de Lodygin), kies nomo estas atribuita al unu el Odesaj stratoj. V. Didriĥson estis pasia e-isto, multon rakontanta pri Esperanto-movado antaŭ la 1-a mondmilito.



Reliefo de S. Rublov.
Skulptisto N. Blajkov

Rublov estis erudicia homo, kiu interesiĝis pri multaj fakoj. Ekzemple pri pentroarto: en lia kolekto enhavanta 10 000 ekzempleroj estis reproduktaj de famaj bildoj.

Rublov jam militservis en Ruĝa armeo, kiam komenciĝis la 2-a mondmilito. Dum longaj 5 jaroj Rublov servis en kemia taĉmento. Post la milito Rublov revenis al Esperanto-tradukado. Fine de la 1950-aj jaroj en Odeso renaskiĝas Esperanto-klubo kaj Rublov fariĝas ĝia aktiva aganto. Li aktive korespondis en la lastaj du jardekoj de sia

vivo.

Laboremo de Rublov estis neimageble granda. Li verkis poezian sonan vortaron de Esperanto, strukturan vortaron, leksikonon de proksimaj formoj, oftecan analizon de Esperanto-leksiko.

Sed speciala ŝato de Rublov estis poezia tradukado. La tradukoj el Majakovskij, Jesenin, L. Ukrainka kaj precipe fablaro de Ivan Krylov ekvidis la mondon en formo de libroj. Tamen plejparto de liaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj, samkiel poeziaj tradukoj, restas en manuskriptoj. Lia traduko de *Eŭgeno Onegin* (A. Puŝkin) estas plenumita konforme al liaj sonaj kaj strukturaj principoj. Krom *Eŭgeno Onegin* li



tradukis *Kupran rajdanton, Malgrandajn tragediojn, Sudajn poemojn* kaj ĉiujn lirikaĵajn versaĵojn de Aleksandr Puŝkin.


Familio de Rublov: patro Grigorij Jakovleviĉ Rublov batalis dum la Rusa-Japana milito; frato Vladimir estis konstruikiisto-mekanikisto; frato Aleksandr estis fama medicinisto, li trafis en Usonon kaj dum la 2-a mondmilito strebis tie armeaniĝi por batali kontraŭ faŝismo, sed ne ricevis permeson; Rublov havis du filojn; (1937) loĝis en Jaroslavo, kaj eldonigis tri librojn kun poeziaj trafukoj de sia parto.

Bibliografio:

Fersman A. *La Kemio de l' Universo*. El rusa lingvo tradukis S.Rublev, SAT, 1925, 79 p.;

Fersman A. *La vojo al scienco de estonto*. SAT, 1928;

Bogdanov A. *Ruĝa Stelo*. (kunlabore kun aliaj). SAT, 1929;



Рублёв А. *Кружок эсперанто*. (Rondeto Esperanto, 1927, 1928, 1929, 1930, 1931, 1932, 1934, 1936).

Majakovskij V. *Per voĉo plena*. (1930);

Jesenin S. *Versoj elektitaj*. (Trad. H.Drezen, K.Gusev, I.Ĥoves, S.Rublov, 1965)

Ukrainka L. *Liriko*. (1971).

Jesenin S. *Lulkantas vintro bona'* // Nova Esperanta krestomatio, p.494-495;

Ivan Krilov. *Elektitaj Fabloj*, tradukis el la rusa S.G. Rublov. – Antverpeno; La Laguna: TK; Stafeto, 1979. 336 p. (serio Oriento-Okcidento, n-ro 15)

I. A. Krilov, *111 Fabloj*, tradukis Sergej Rublov. HEA. Budapest. 1979. 133 paĝoj.

Rusa poezio en tradukoj de Sergej Rublov. A.S.Puŝkin. Remder,

Jaroslavl, 2002. 467 p.

Rusaj poetoj de la XVIII-XIX jarcentoj en tradukoj de Sergej Rublov. Filigranj, Jaroslavl, 2019. 271 p.

Rusaj poetoj de la XX jarcento en tradukoj de Sergej Rublov. Filigranj, Jaroslavl, 2020.

Pri Rublov:

EdE, p.473;

Rublov Sergej Grigorjeviĉ // *CkK*, 1991/2(11), pp. 1-4;


Sergej Grigorjeviĉ Rublov // *LOdE*, 2001/1(75), p.15;

Kiseljova O. *Sergej Rublov 100-jara* // *REGo*, 2001/1(3), p.36-39;

Samodaj V. *La tradukinto Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901–1979)*. *Neimagebla laborkapablo* // Rusa poezio en tradukoj de Sergej Rublov. *A.S.Puŝkin*, Jaroslavl: *Remder*, 2002, 468 p., v.p.8-14.

Rutenburg (ĝis 1937 Kopejkin), **Viktor Ivanoviĉ** (11.11.1911, Moskvo – 06.05.1988, Leningrado). Sovetia historiisto, profesoro de Leningrada Universitato (1971), doktoro pri historiaj sciencoj, membro-korespondanto de Akademio de Sciencoj de Sovetio.

En la 1927-30 studis en Dnepropetrovska Universitato. Instruis historion en u. Donecko. Ekde 1934 loĝis en Leningrado. Li estis arestita la 28.07.1938, la 14.07.1939 la krimafero estis ĉesita pro manko de la krimo.



En la 1940 li finis Leningradan Ŝtatan Universitaton. Ekde la 23.06.1941 ĝis la 07.02.1946 militservis en la Ruĝa Armeo. Dum la 2-a mondmilito li ricevis ordenon *Ruĝa Stelo*, ordenon de la *Patrolanda milito* kaj medalon *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*.

En 1946 Rutenburg estas scienca kunlaboranto. Ekde 1950 instruis en Leningrada Universitato. Rutenburg estas aŭtoro de pli ol 200 sciencaj verkoj pri Mezepoko. Rutenburg estas laŭreato de la Ŝtata monpremio de Sovetio (1987).

Verkaro:

Kopejkin V. *Ruĝa flago en preĝejo // Sennaciulo*, 14.11.1929/267, p.79;

Junga E. *Karbhakisto Davidov*. Tr. V. Kopejkin kaj Bananin. EKRELO, 1932, 26 p.;

Копейкин-Волгин В. *Пионеры, учите эсперанто. Пioniroj, lernu Esperanton*. Рассказ пионерам о международном языке. Издание ЦК СЭСР, Москва, 1934, 40 с.

Ruus, Neeme (11.12.1911, vil. Oparino, Vologda gub.—02.06.1942, Tallinn). Ministro de Sociaj Aferoj de Estonio (1940). Naskiĝis en familio de ŝuisto en Vologda



gub. Post la revolucio en Ruslando (1917) la familio revenis Estonion. Ruus lernis en kelkaj elementaj lernejoj (Elva, Võru, Valga) kaj en Pärnu gimnazio en la 1926-30. Estante gimnaziano Ruus aliĝis al Estona Unio de socialisma junularo kaj post kelkaj jaroj eniris al Tallina estraro de la Unio. Ruus posedis 8 lingvojn inkluzive Esperanton. Ruus esperantistiĝis estante lernanto en Pärnu, aktiviĝis en la fino de la 20-aj jaroj, propagandis, gvidis kursojn en multaj lokoj en Estonio kaj Svedio; kunlaboranto de *InfEAE*, en 1930-32 Esperantista Turista Komisiono, estrarano de EAE 1936-38; prelegis en semajnaj kaj monataj

radio-elsendoj. Laŭ *HdE*: “En Pärnu (20 000 loĝ.) komence de la februaro de 1930 s-ro Ruus ekinstruis 33 lernantojn 9-14-jarajn. La grandan intereson sendube kreis gimnaziano de la lasta klaso Ruus, kiu estis ĉefaranĝanto por akcepti somere svedajn gastojn. Ĉar lokaj gazetoj rilatas favore al Esperanto, Ruus ne laciĝas doni multajn artikolojn kaj artikoletojn pri la movado”. Kiel informas *HdE* (N 35 (688), 04.09.1932): “La 29.06.1932 nia samideano Ruus, kiu gvidis E-kursojn pasintvintre en Laponio, ekmilitservis”.

En la 1930 Ruus laboras en librotenejo de la ĵurnalo *Rahva syna* (Voĉo de la popolo). En la 1930 li konatiĝis kun estro de svedaj esperantistoj Malmgren, kiu proponis al Ruus labori kiel sezona turisma ĉiĉerono en Svedio. Dank’ al Esperanto Ruus fortigis kontaktojn kun sindikatoj de Skandinavio kaj sukcesis ĉiujare prelegi en Danio, Germanio, Holando, Belgio, Francio ĝis 1940. Ruus instruis Esperanton kaj mem studis en Ĝenevo.

Post kiam Estonio iĝis la sovetia respubliko, Ruus laboris kiel konsultisto de la Estona Kleriga Asocio, aktivulo de la sindikata kaj laborista movadoj, poste sekretario de Estona Komunista Partio. Maje de la 1941 li estas vicprezidanto de la Soveto de

Popolkomisaroj. Post la komenco de la Granda Patrolanda milito en 1941 Ruus laŭ tasko de Estona Kompartio konsentis labori konspire. Li preparas konspiraĵojn en Tallinn kaj en kamparo. Ruus kun sia helpanto Oskar Ĉer ricevis presmaŝinon, tajpilon, du revolverojn kaj 5 000 rublojn. La konspirantoj estis avertitaj pri la baldaŭa aresto. Ili fuĝis al rezerva loĝejo, sed trafis en embuskon.

La 2-an de junio 1942 Ruus estis mortpafita far' de faŝistoj. Laŭ onidiro Ruus-on perfidis ne elteninte torturojn lia pli frue arestita ĉefo Karl Sjare – la 1-a sekretario de Estona Kompartio.

Ruus-familio: edzino Linda Karin Ruus (naskita Aruküll), filino Ingrid Ruitel (naskita Ruus) (03.11.1955) konata folkloristino kaj edzino de eksprezidanto de Estonio Arnold Ruitel; ŝi havas du filinojn: Maris (1958) kaj Anneli (1965).

Bibliografio:

Ruus N. (SAT-ano 15428, Estonio). *Revolucio de l' jaro 1905 en Rusio // Sennaciulo*, 18.12.1930/324, p.89-90;

Metsanurk, Mait. *Fr. Arraste kaj filoj*. El la estona tr. N.Ruus // *LM*, 1931/5, 86-89;

Ruus N. *Haridusolud Taanis*. Eesti Haridusliit (Klerigsistemo en Danio), 1935, p.98;

Ruus N. *Raamatukogu kultuuritegurina*. Autori kirjastus (Biblioteko kiel motivo kleriga. Aŭtoro eld.), Tallinn, 1935, p.36;

Ruus N. *La nunaj kaj estontaj taskoj de la estona esperantistaro // InfEAE*, 1940/7-8;

Tra la gazetaro // *Esperanto* (UEA), 1941/487 (1), p.3;

Kuusberg, Paul. *Habemik* (Barbulo). Eesti Raamat, 1985.

Pri li:

Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio, 1989/6 (268), p.2.

J. Ojalo; A. Sidorov

Seljankin, Aleksandr Miĥajloviĉ (28.03.1918, u. Nevjansk, Perma reg., — 10.05.1997). Direktoro de la Ŝtata arkivejo de Perma regiono. En la 1940 Seljankin finis Juran Universitaton en Sverdlovsko (nun – Jekaterinburgo). Dum la 2-a mondmilito estis mobilizita, en 1945 batalis kontraŭ Japanio. Post la milito militservis kiel armea prokuroro en diversaj armeaj kontingentoj de For-Orienta, Ĉekarpata kaj Urala armeaj arondismentoj. Post malmobilizo en la 1969 laboris kiel ĉefinspektoro de Perma regiono. En la 1970-75 direktoris en Ŝtata Arkivejo de Perma regiono. Havis ordenojn pro la dumilitaj heroaĵoj.

Esperantistiĝis en la 1934. Aktiva partoprenanto de permaj kaj uralaj Esperanto-renkontiĝoj dum lastaj jardekoj, konstanta membro de Urala ES.

Siitam, Aleksander (28.02.1907, Peterburgo, — 10.11.1970). Bibliotekisto. Siitam lernis en lernejoj de Petrogrado, Pärnu, Tallinn, studis en Tartua Universitato filozofion, finis en la 1940; estis instruisto en Tallinn en la 1940-41. En la Soveta armeo partoprenis la 2-an mondmiliton 1941-45, poste laboris en bibliotekoj en Tallinn, en 1967 emeritiĝis pro nekuracebla malsano kaj translokiĝis al Tartu.

Siitam esperantistiĝis en la 1925 en Pärnu, translokiĝinte al Tallinn aliĝis al la Societo *Espero*, estis



estrarano de Esperanto-Asocio de Estonio en la 1931-38. Siitam estis unu el la plej aktivaj membroj de Akademia Esperanto-Klubo, ofte paroladis en la esperantlingvaj elsendoj de Estona Radio en la 1928-40; gvidis Esperanto-kursojn en Estonio, Viipuri en la 1932-33, en Nederlando en la 1933-34.

Post la renaskiĝo de Esperanto-movado en Sovetio Siitam demonstris Cseh-kurson en Moskvo kaj Erevano en 1957, en Vilnius en 1959, en BET-oj ekde 1961. Siitam prezentis la metodon en Tallinn, Moskvo, Leningrado, Rostov-sur-Dono (1957), Vilnius kaj Kaŭnas en 1962-66, en televidaj dissendoj en Tallinn kaj Erevano, artikoloj en *Nuntempa Bulgario* 1959/8. Siitam estis unu el la plej aktivaj kunlaborantoj de *Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio* dum ties unua aperoperiodo en la 1923-40.

Bibliografio:

Sōnake esperantost. Keel ja Kirjandus 1959/11, p.676-681;

Veidi esperantost. Matkatarakuste taskuraamat. Eesti Riiklik Kirjastus 1960, p.176-181;

Aleksander Siitam, mallonga aŭtobiografio // *InfEAE*, 1996/3.

J. Ojalo

Sneĵko, Dmitrij Semjonoviĉ (beloruse: Зьміцер Сьняжко), (pseŭdonimoj: Zm. Bjeli, Neĝo, T. Blanka), (24.09.1903, Orŝa, Belorusio, – 17.02.1957, Permo). Kuracisto. Esperantiĝis en 1918. Membro de CK SEU. Sneĵko estis aktiva Esperanto-funkciulo en



Belorusiaj verkistoj: staras (demaldekstre dekstren) Grigorij Rapoport - eskapis la reprezaliojn en Novosibirsk; Andrej Aleksandroviĉ -- bagnado 1937-1954; Dmitrij Sneĵko bagnado 1937-1939; Sidas: Alesj Dudar - mortpafita 1937; Miĥasj Zareckij - mortpafita 1937; Akita Ujaku (kun lipharoj); Tiŝka Hartnlj - sin mortigis en prizona malsanulejo 1937.

Belorusio: en la 1923 li estis kunorganizinto de Belorusa Esperanto-Federacio, en la 1925 vic-prezidanto de Centra Oficejo de Belorusa Federacio de SEU, en la 1926 membro de Sekretariaro de Belorusa Centra Oficejo de SEU, en la 1927 sekretario de la Oficejo de Internacia Laborista Interligo ĉe Belorusa Radio de SEU en Minsko. Sneĵko multe laboris por organizo de kolektiva Esperanto-korespondado kaj

Esperanto-radiodisaŭdigoj el Minsko.

Post kiam la familio ekloĝis en Gomel, kie lia patro estis estranga poŝt-telegrafa oficisto, Dmitrij por helpi la familion devis eklabori ekde dekkvarjara aĝo. Dank' al la oficaj kontaktoj de lia patro li ricevis postenon de telegram-portisto, kaj poste de telegram-kontrolisto.

En la 1918 Sneĵko aliĝis al la Esperanto-societo fondita en Gomel. Ĝis la 1921 Sneĵko laboris en Gomela telegrafoficejo. En la 1922 li finis medicinan fakultaton de Belorusia Ŝtata Universitato kaj poste (1934) estis altgrada sanitara inspektisto ĉe Centra Konsilio de Sindikatoj de Belorusio, asistanto ĉe katedro de laborhigieno en Belorusia Medicina Instituto, membro de loka komitato ĉe sekciburoo de scienclaboristoj.



Aktiva SAT-membro.

En la 1925 Sneĵko, estante studento publikigis aron da literatur-kritikaj artikoloj en la monata gazeto *Ĉirvoni scĵag* (La ruĝa standardo), i.a. pri la tiutempe furoraj poemaroj de la fama rusa poeto Sergej Jesenin (1895-1925) *Betulkatuno* kaj *La lando Sovetia*, kuraĝe mokante la unuan kaj laŭdante la duan. En la sama revuo aperis la unuaj noveloj kaj eseoj de Sneĵko. Poste Sneĵko kunlaboras kun aro da gazetoj bulgaraj, germanaj, finnaj kaj belorusaj. Ekzemple du literaturaj unuiĝoj *Uzviŝŝa* (Altaĵo) kaj *Polimĵa* (Flamo) en la samtitolaj gazetoj publikigadis verkojn de Sneĵko. En *Uzviŝŝa* aperis liaj eseoj *Literatura Japanio*, *Nuntempa finna literaturo* k.m.a. En la sama gazeto Sneĵko gvidis konstantan kronik-kolumneton, kiu enhavis informojn pri alilandaj kulturaj eventoj. La 24.02.1928 Minskon vizitas la fama japana dramverkisto-esperantisto Akita Uĵaku (1883-1962). Dum la tuta tempo de lia kelktaga restado en Minsko Sneĵko estis lia akompananto kaj interpretisto. Poste en *Polimĵa* aperis lia granda artikolo pri Akita kun foto, kie la japano sidas inter kelkaj belorusaj literaturistoj.

Sneĵko el la belorusa lingvo esperantigis verkojn de belorusaj verkistoj. Meze de la 1930-aj Sneĵko multe laboris por organizo de medicinista sekcio de SEU.

Dum multaj jaroj Sneĵko korespondis kun fama teoriisto de kosmaj flugoj Konstantin Ciolkovskij (1857-1935). La korespondado startis en la 1927 kaj daŭris ĝis la forpaso de la scienculo en la 1935. Grava rezulto de la korespondado estis la konsento de Ciolkovskij akcepti honoran membrecon de SEU; kelkaj liaj eldiroj pri Esperanto iĝis vaste citataj kiel propagandiloj. Ciolkovskij donacis al Sneĵko kelkajn siajn verkojn, eldonitajn broŝurforme, kiujn Sneĵko esperantigis.

Ekzemple en la 1929 Sneĵko laŭ peto de francaj esperantistoj el Lion verkis artikolon pri Konstantin Ciolkovskij. Ciolkovskij speciale por la artikolo sendis sian foton. La artikolon de Sneĵko oni publikigis en *Sennaciulo*. Poste ĝi estis retradukita kaj publikigita en ses ceteraj periodaĵoj. Krom tio Sneĵko verkis grandan artikolon *Raketo de la estonteco*, dediĉitan al la scienculo kaj publikigitan en *Sennaciulo* (1929/4).

Dmitrij Sneĵko estis arestita la 05.02.1936, kondamnita la 07.05.1936 al tri jaroj, rehabilita de la Supera Kortumo de Belorusia SSR la 20.03.1990. La punperiodon Sneĵko kun la familio restadis en urbo Bogorodick en Tula regiono. Post sia liberiĝo en la 1939 Sneĵko oficis en Bogorodick dum du jaroj ĝis la komenco de la 2-a mondmilito. Dum la milito Sneĵko aktive okupiĝas pri medicina helpo al la militantoj kaj al la loĝantaro de apudfrontaj regionoj. Pro tiu agado li estis honorigita per speciala insigno *Avangardulo de sanprotektado*, kaj ankaŭ per la medaloj *Por heroa laboro dum la Granda Patria milito* kaj *Por la defendo de Moskvo*. Postmilite Sneĵko ricevis postenon de estro de la regiona sanitara inspektejo en Tula, kaj poste eĉ pli altan, nome tiun de vicestro de la fako pri sanprotektado en la regiona administracio. En la fino de 1947 Sneĵko estis sendita al la urbo Molotov (tiun nomon havis urbo Permo en 1940-57) por okupi postenon de estro de la regiona sanprotektata fako, kaj eĉ kandidatiĝas tie por esti elektota al la regiona soveto. Ekde la 1953 Sneĵko estis ĉefkuracisto en la sanatorio Ust'-Kaĉka en la Molotova (Perma) regiono, aktive verkis kaj publikigis artikolojn pri famaj medicinistoj. Sneĵko forpasis pro la kancero la 17-an de februaro 1957.

Bibliografio:

Okcidenta Blankrusio kaj Blankrusa Kampano-Laborista Unio "Gromada". Elblankrusigis Dim.Sneĵko. Minsk, 1928, 30 p.;

Ciŝka Hartny. *Mallaboremulo*. Tr. el la belorusa T.Blanka // *HdE*, N 17 (513), 1929;

Снежко Д.С. *Советы врача по восстановлению и благоустройству колхозных селений*. Тула, 1947, 32 с.;

Снежко Д.С., Котюкова Е.Ф. *Санитарное просвещение в Тульской области*. Тула, 1947, 47 с.;

Pri Snejko:

EdE, p.497;


NikSt. Li estis la unua // Sennaciulo, 1992/3, p.25, 28-30;

Радечко П. *Как Снежко критиковал Есенина*. (Kiel Snejko kritikis Jesenin-on) // *Нау Современник*, 2008/12, с.267-269;

Снежко Э. *По страницам памяти. Воспоминания и поэмы*. (Laŭ paĝoj de la memoro. Rememoroj kaj poemoj), М., 2011, с.82;

Bronštejn M. *Sortoj frakasitaj*, Moskvo: *Impeto*, 2017, v.p. 6-14.

Ŝumarin, Nikolaj Ivanoviĉ (06.01.1894, vil. Gorbovo, Ivanova reg.—1971). Esperantiĝis en la 1909. Kronikisto de E-movado, idea E-gvidanto. Membro de SEU (Ivanova Regiona komitato de SEU). En la 1927 Ŝumarin laboris en biblioteko de la urba teksfabriko. Kun la edzino kaj du gefiloj loĝis en dometo (3 x 4 m).



En la 1938 Ŝumarin studis en Komunista Instituto en Leningrado. Membro de la komunista partio ekde la 1920. Ekde julio 1941 Ŝumarin partoprenis en la 2-a mondmilito kiel propagandisto. Estis dekorita per la medalo *Pro la batalaj meritoj* (24.01.1945) kaj ordeno *Ruĝa Stelo* (28.07.1945), medalo *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945*.

Dum 25 jaroj Ŝumarin etis direktoro de biblioteko de la Pedagogia Instituto en Ivanovo. Li kolektis abundan materialon kaj kompilis 10 jarlibrojn pri la kluba E-agado. Ŝumarin estas redaktoro kaj kompilinto de *Fajreroj de Esperanto* (1957-68).

Pri li:

Ŝumarin N. *Tago el mia vivo // Sennaciulo*, 21.05.1927/138, p.3.

95 jaroj Esperanto-klubo de Ivanovo // der esperantist, 1986/2(136), p.42.

Ŝuvajev, Timofej Dmitrijeviĉ (10.06.1915, vil. Aleksandrija, Stavropola ter., — 14.05.2001, Niĵnevartovsko). Ŝuvajev naskiĝis en multnombra vilaĝa familio, kiu enhavis 18 geinfanojn. En la 1921 la gepatroj de Ŝuvajev mortis kaj infanoj estis disloĝigitaj al diversaj orfejoj.



En la 1928 Timofej Ŝuvajev studas en Moskva agrikultura lernejo. En la 1932 finas Vladikavkazan Agrikulturan Instituton. En la 1928-29 Ŝuvajev estante studanto de la Moskva agrikultura lernejo praktikajn laborojn spertis ĉe sciencisto-praktikulo Ivan Miĉurin. Ĝuste Miĉurin rekomendis al Ŝuvajev lerni Esperanton kaj donis adreson de SEU. Ŝuvajev skribis leteron kaj ricevinte korespondan kurson de Esperanto sukcese ellernis ĝin kaj ricevis SEU-karton kun N 4001 kaj poste eĉ SAT-membrecon. Ŝuvajev abonis *Sur Posteno*, *Sennaciulo*, *Mejdunarodnij Jazik*. Ŝuvajev havis vastan Esperanto-korespondadon kun esperantistoj de Bulgario,

Grekio, Germanio, Francio, Anglio, Ĉeĥoslovakio, Hispanio kaj Jugoslavio.

Ekde 1936 Ŝuvajev estras Nord-Kaukazan filion de SEU. Dank'al penoj de esperantistoj estis fonditaj Esperanto-komitatoj en la urboj: Ordĝonikidzo (nun Vladikavkazo), Mineralnie Vody, Pjätigorsko, Kislovodsko, Groznyi, Mahaĉkalao kaj Derbento. Entute oni kalkulis ĉ. 240 homojn. Esperantistoj aranĝis Esperanto-renkontojn, koncertojn, kvizojn, ekskursojn al naciaj osetaj kaj kabardaj edziĝfestoj, reciproke interŝanĝis per modestaj donacetoj kun eksterlandaj esperantistoj.

En la 1938 Ŝuvajev estis mobilizita al la Ruĝa armeo. En 1939 Ŝuvajev en la trupo de mitralistoj partoprenis en la "Vintra milito" kontraŭ Finnlando. En julio de 1941 ricevis dummilitan vundon (entute kvin vundojn li havis). Post la resaniĝo militis en la 256 fusilista divizio de la 11 sturma armeo ĉe Leningrado. La venkon Ŝuvajev renkontis ĉe Danubo. Pro la partopreno en la milito Ŝuvajev ricevis ordenojn *Ruĝa Stelo* kaj du de *Patrolanda milito* de la 1-a kaj 2-a gradoj.

Dum la kuracado en iu moskva hospitalo en 1947 Ŝuvajev tralegis en iu ĵurnalo, ke ekzistas Esperanto-rondeto ĉe iu uzino kaj havas problemojn por disvastigado de Esperanto. Ŝuvajev kaj lia najbaro en la hospitalo *Heroo de Soveta Unio* decidis veni al Kremlo por interparoli kun la membro de Politburoo de CK de Komunista partio Mikaelo Suslov. Suslov post la konsulto kun vicestro de Klerig-Ministerio rifuzis helpi al esperantistoj pro la malbona famo pri esperantistoj. Suslov promesis nek helpi nek malhelpi al esperantistoj. Ankaŭ rekomendis ne ĝeni la partiajn instancojn.

En la 1959 Ŝuvajev venis al Larjak, en la 1963 al Niĵnevartovsko. Direktoris en lernejo N-ro 1 de Niĵnevartovsko.

En Niĵnevartovsko Ŝuvajev fondis Esperanto-rondeton kaj dum multaj jaroj instruis Esperanton en ĝi. Ŝuvajev fondis regionesploran muzeon. Laŭ dekreto n-ro 144 de la urbestro la 11.03.1996 Ŝuvajev ricevis titolon de la *honora civitano* de la urbo Niĵnevartovsko. En la 21.06.2001 la regionesplora muzeo estis renomita al Ŝuvajev-Muzeo.

Taalmann, Georg (29.04.1907, Viljandi, — 1943). Estono. Vizitis elementajn lernejojn en Vana-Võidu, Vändra, Haljava 1916-35, okupis sin kiel somersezona kamplaboristo ĉe bienuloj, vintre trovis hazardajn laborojn 1925-38, estis komunuma kuriero 1938-40. Taalmann aliĝis komence de la 1930-aj jaroj al laborista movado en Tallinn; en la 1940-41 li estis varbita al politika agado en komisariato de kamparmastrumado. En la 1941 li evakuigis al Ĉeljabinsk, kie en komenco de 1942 estis mobilizita. Ĉe urbo Velikie Luki falis en kaptitecon, restadis en la kaptitejo Polock kaj en Viljandi ĝis la 1943. Pri plua sorto de Taalmann mankas informo.

Taalmann Esperantiĝis en la 1925 en Raasiku (Haljava), gvidis kursojn en la loka kleriga societo Harju-Jaani, kie organizis kaj gvidis dum deko da jaroj Esperanto-rondon; korespondadis, gvidis kursojn en Rakvere, partoprenis Esperanto-agadon en Tallinna *Espero* kaj laborista Esperanto-societo, estis estrarano de *Espero* en 1935, verkis versaĵojn kaj taglibron, kunlaboris kun Esperanto-grupo *Ondo*.

Bibliografio:

Taalmann G. *Taglibro kaj versaĵoj* // *Amikeco*, 28, 29, 30, 31, 32, 33, 34 (1978-79);
Ojalo J. *Li estis prolet-esperantisto* // *Amikeco*, 28.

J. Ojalo



Teterin, Georgij Nikolajevič (03.04.1905, u.Mineralnie Vody—03.10.1972, Leningrado). Inĝeniero pri radiokomunikado. En 1939 finis Inĝenieran fakultaton de Milita Elektroteknika akad. en Leningrado, laboris kiel instruisto pri sia specialeco en la Milita teknika lernejo de komunikado en la urbo Groznij, Militakademio en Leningrado, Tutunia politeknika instituto Esperantiĝis en 1920. Partoprenis en la 3-a Tutrusia Esperanto-kongreso (1921), en la 6-a SAT-kongreso (1926). Estis membro de Esperanto-sekcio ĉe leningrada Kirova-radiocentro (1927-37).

Partoprenis en la Dua Mondmilito. Pro la militaj agoj ricevis medalon “Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito 1941-1945”. Ricevis rangon de inĝeniero-kolonelo de la soveta armeo.

Aktivis en Leningrada E-movado en 1959-72. Kun Z.V. Semjonova verkis *Gvidlibron de la lingvo Esperanto* (1957), helpis al Z.V. Semjonova kaj M.I. Isajev verki *Lernolibron de la lingvo Esperanto*, aperintan en 1984.

Titov, Stepan Pavloviĉ (23.04.1910, vil. Verĥne-Ĵilino, Kosjiĥin distr., Altaja ter., — 18.10.1993). Naskiĝis en vilaĝa familio de Pavel Ivanoviĉ Titov. En la 1920-29 vizitas lernejon. Ekde la 1929 laboris instruisto en baza lernejo. En la 1930-33 Titov studas en Moskva konservatorio. En la 1933-36 instruas la rusajn lingvon kaj literaturon en lernejo por vilaĝa junularo.

En 1934 Stepan Titov edziĝas al Aleksandra Miĥajlovna Nosova, kiu la 11.09.1935 naskis filon German, la estontan kosmonaŭton n-ro 2 kaj filinon Zemfira (1941). En la 1930-aj jaroj Titov, lerninte Esperanton, abunde korespondis kun esperantistoj el Germanio, Japanio, Aŭstralio.

En la 1938-65 Titov instruistas en vilaĝo Polkovnikovo. Ekde januaro de la 1943 ĝis 1945 Titov partoprenis en la 2-a mondmilito kiel ŝoforo en la taĉmento pri aviada-teknika provizado. Sur la aerodromo ĉe Poltava Titov priservis usonajn aviadilojn ricevajn laŭ *Lend Lease*. Pro la partopreno en la 2-a mondmilito Titov estis omaĝita per ŝtataj ordenoj.

Post la milito Titov revenis al instruista praktiko. En la 1949-54 Titov finis en Moskvo Ŝtatan Centran distancan kurson de fremdlingvoj kaj komencas instrui la germanan. Krom la germana kaj rusa lingvoj Titov instruis matematikon, historion, geografion, fizikon, kantarton, botanikon kaj desegnadon. En la 1961 Titov emeritiĝis, en 1965 translokiĝis al sia filo loĝanta en Ŝĵolkovo (Moskva reg.). En la 1964 Titov partoprenis en Esperanto-kongreso en Hago. Laŭ liaj vortoj: “Por mi estis vera miraklo dum interkona vespero 2500 delegitoj el 43 landoj ekparolis per la sola, komprenata por ĉiuj lingvo... kvazaŭ ili ĉiuj estis en medio de la samlandanoj!”

En la 1965-93 Titov dediĉas sin al ĵurnalistiko, literaturo kaj sociagado. En 1965 estas eldonita libro de Stepan Titov *Du infanaĝoj*.

Laŭ guberniestra decido de la Altaja teritorio en la 2007 estis lanĉita Titov-premio celanta subteni vilaĝajn laboristojn pri klerigado.



Pri li:

Я видел и слышал // *Кутаисская Правда*, № 137 от 17.10.1961 г.

Отец космонавта // *Культура здоровой жизни*, 2010/3;

Rapport A. Renkontiĝoj kun Stepan Pavloviĉ Titov // *REGo*, 2014/1(80), p.12-13.



Toll' (ruse: Толль), **Boris Ĥristoforoviĉ** (23.11.1903, Sankt-Peterburg—1970). Pedago. Esperantiĝis en la 1917, renovigis esperantistecon en la 1957. Leningrada e-isto. Partoprenis en la 2-a mondmilito. Ricevis medalon *Pro la defendo de Leningrado*.

Bibliografio:

Toll B. *Ĉe leningradaj esperantistoj* // *Esperanto* (UEA), 1956/608-609 (7-8), p.110;

Толль Б.Х. доцент. *О международном языке эсперанто* // *Дом учёных им. М. Горького. Секция международного языка эсперанто. Отчётные и информационные материалы секции*. Ленинград, 1958 г.;

Дом учёных им. М. Горького. Секция международного языка эсперанто. Отчётные и информационные материалы секции.

Ленинград, май 1958 г. Редактор Б.Х.Толль.

Toomsalu, Valter (22.09.1912, Võhma,—01.10.1997). Lernis en gimnazio de Viljandi, laboris en Võhma, partoprenis en la 2-a mondmilito 1941-44. Post la milito laboradis en Tallinn kiel sekurigoficisto. Toomsalu Esperantiĝis en la 1929 en Viljandi kiel lernanto de la urba gimnazio. En la 1957 aliĝis al la E-movado en Tallinn, partoprenis agadon de Tallina Esperanto-Klubo kaj Esperanto-Asocio de Estonio kaj ĉiujn BET-ojn, ĉefe kiel fotisto. Sian foto-historion pri la movado – 17 albumojn – li heredis al la arkivo de EAE.

J. Ojala



Veršin, Aleksej Iljiĉ (29.06.1907, Moskvo—1990, Odeso). Diplomita inĝeniero, ŝip-mekanikisto. Loĝis en Odeso en la 1920-aj jaroj. Fine de la 1920-aj jaroj fariĝis membro de CK de SEU. Fine de la 1930-aj jaroj li sukcesis eviti reprezaliojn, ĉar estis ekster Moskvo.

Li partoprenis en la 2-a mondmilito. Pro la militaj agoj li estis dekorita per medalo *Pro la militaj meritoj*, pro *La defendo de Kaŭkazio*, pro *La defendo de Sebastopolo*, medalo *Pro la venko super Germanio en la Granda Patrolanda milito*

1941-1945, *Ordeno Ruĝa Stelo*, *Ordeno de La Patrolanda milito* de la 2-a grado. Kapitano de la III-a rango. Post la milito li instruis en Marista lernejo.

Meze de la 1950-aj jaroj li aktive partoprenis en renasko de la Esperanto-movado en Odeso, instruis Esperanton, organizadis la kluban vivon. En la 1956 li partoprenis en la oficiala rehabilito de reprezaliitaj en Odeso esperantistoj.

Li estas aŭtoro de rusa lernolibro *La Internacia lingvo Esperanto* (1960).



N. Gudskov, A. Sidorov

Zamenhof, Lev Miĥajloviĉ (25.12.1920, Moskvo,--26.01.1995, Moskvo). Nepo de kuzo de L.L. Zamenhof. Kolonelo de la soveta armeo. Dum la 2-a mondmilito Lev Zamenhof militservis en la 1315-a fusilista regimento de la 173-a fusilista divizio. Honorita per la *Ordeno de La Granda Patrolanda Milito* de la 2-a grado. Laŭ profesio li estis instruisto de fizika kulturo en Sovetia armeo kaj okupiĝis ĉefe pri konstruado de sportaj objektoj (stadionoj, sportaj centroj ktp.) por armeaj sportistoj. En la 1991 Lev Zamenhof suferis apopleksion kaj restis invalido ĝis sia morto. Esperantisto, li ne estis kaj kun esperantistoj, diference de sia fratino, d-ro de juraj sc. Zoja Mihajlovna Zamenhof (1924-1992), ne kontaktis.

Zisman, Aron Borisoviĉ (ps-j: Z. Arbo, A.Z.) (07.12.1911, vil. Bajevo, Mogiljova gubern.--199?). E-1928. **Z.** estas aŭtoro de stenografia sistemo por E-o *Esteno*, ankaŭ de ilustrita lernolibro *Ni lernas Esperanton*.

Partoprenis en la 2-a mondmilito de la aŭgusto 1941. Dekorita per du ordenoj *Ruĝa Stelo* (11.02.1942; 30.05.1945), medalo *Pro la militaj meritoj* (09.04.1945), ordeno de la *Patrolanda Milito* de la 1-a grado (06.04.1985).

En komenco de la 1960-aj jaroj Zisman multobbligis kelkajn negrandajn verkojn en Esperanto sur fotopapero. Tiam lia laboro havis tre gravan kulturigan signifon por soveta esperantistoj, ĉar ekzistis granda manko de bonaj legaĵoj kaj alilandaj eldonaĵoj estis malfacile atingeblaj. Zisman esperantigis poeziaĵojn ne nur el la rusa, sed ankaŭ el la franca kaj germana. En la 1990-91 koresponde partoprenis laboron de MLEK.


Verkaro:

Zisman A.B. Мнемонический эсперанто-русский словарь. Москва, 1962, 14 с. (Мнемоника Esperanto-rusa vortaro);

Zisman Ф.Б. Мы учим эсперанто. Москва, 1964, 25 с. (Ni lernas Esperanton);

Gorjkij M. *V.I.Lenin*. Elrusigis: K.Gusev, I.Ĥoves, A.Zisman. Moskvo, 1969, 50 p.

Zisman A. El Alfons de Lamartin. *Al novaj bordoj nin puŝadas tempokur'...*; El Julia Drunina. *Don-Kiĥot // Moskvaj sonoriloj, M.: Impeto, 2007, v.p. 126-128.*



Zubkov, Anatolij Nikolajeviĉ (03.07.1924, Kievo, — 30.12.1997, Moskvo). Lingvisto, posedanta 12 lingvojn inkluzive Esperanton. La unua diplomita jogano de supera grado en Sovetio, populariganto kaj propagandisto de la Hatha-Jogo, prezidanto de la Tutunia Asocio de Evoluo de Homo, honora reprezentanto de Sovetio en la Internacia Tutmonda Unio Joga. Popularigis jogon per artikoloj kaj prelegoj. Zubkov estas aŭtoro de filmo *Hindiaj jagoj – kio ili estas?* Zubkov konsistis en komisiono pri kulturaj kontaktoj kun eksterlandoj ĉe SSOD. Estante en Hindio Zubkov fondis Tuthindian Esperanto-Asocion.



Post fino de lernejo en la 1942 Zubkov volontule foriras al la milito. Li venis Leningradan fronton kie li estis tradukisto el la germana. Post la milito en la 1946 Zubkov studis en Pedagogia Ŝevĉenko-Instituto sanskriton. En la 1947 en Moskvo li studis la hindan lingvon en Instituto de Orientalistiko. En la 1952 li finis la Instituton kiel hindologo – la fakulo pri Hindio kaj Pakistano. Posedante kelkajn orientajn lingvojn, Zubkov instruis en Milita Akademio de Soveta armeo ĉe Ministerio pri Defendo de Sovetio. Eksiĝinte el la Akademio Zubkov instruis en katedro de Orientaj lingvoj en Instituto de Aziaj kaj Afrikaj landoj ĉe Moskva Ŝtata Universitato. En 1963 laŭ kontrakto pri kulturaj interŝanĝoj Zubkov kun la familio venis labori Hindion. En Universitato de Lakhnaŭ (Uttar-Pradeŝ, 200 km for de Delhio) li instruis la rusan lingvon. Samjare Zubkov konatiĝis kun praktikulo de la Jogo. Ekde la 1960-aj ĝis siaj lastaj jaroj Zubkov dediĉis sin al popularizado de Jogo. Li verkis artikolojn kaj librojn, prelegis kaj mem prezentis ekzercojn. Somere de la 1987 Zubkov kun la edzino venis Leningradon por gvidi 30-tagan prelegaron, sed lin kaptis infarkto. Dum fondo de la Tutunia Asocio de Evoluo de Homo, la unua kongreso de la Asocio elektas Zubkov-on prezidanto. Laŭ decido de la Internacia Tutmonda Unio Joga Zubkov estas elektita honora reprezentanto de Sovetio.

Anatolij Zubkov estis omaĝita per ordenoj *Ruĝa Stelo* kaj *Patrolanda milito* de la 2-a grado; per medaloj *Pro kuraĝo*, *Pro la venko super Germanio*, *Petro la 1-a* (1996), apartan signon de Hindio pro la evoluo de Esperanto.

Anatolij Zubkov estas aŭtoro de lernolibroj pri socia-politika temaro; kolekto de hindiaj fabeloj; lerno- kaj konversacilibroj pri la hindia lingvo; libroj pri Hatho-Jogo.

Zubkov, Nikolaj Borisoviĉ (31.01.1918 – 30.11.2005). Esperantiĝis en la 1932. Ĉinologo. Finis historian fakultaton de Moskva Universitato (1941), armean instituton de




fremdaj (1947), instruisto de mezlernejo en Kazahstan (1941-42); partopreninto en la 2-a mondmilito (1943-45). Zubkov instruis historion de orientaj landoj en Kazaha Universitato (1948-51), aspiranto ĉe Moskva Universitato (1951-54). De 1955 laboris en diversaj redakcioj. Merita kulturaganto de Rusia Federacio.

Esperanistiĝis kaj ekmembriis en SEU en la 1932; de 1934 ĝis decembro 1937 — instruisto de Esperanto-korespondkursoj ĉe CK SEU. Post longa paŭzo reesperanistiĝis en la 1978. Zubkov estas vicprezidanto de ASE, en la 1979-89 — respondeca redaktoro de ties *Informbulteno*. Post la 8-a Kongreso de SEU (Januaro 1989) — estrarano de SEU. Trifoje partoprenis UK-ojn.

Pri li:

Nikolaj Borisoviĉ Zubkov. Rakonto pri mi. // REGo n-ro 1(14), februaro 2003, p.1-2



Zverev, Nikolaj Nikolajevič (1913 — 06.11.2003, Tiĥvino). Ekskolonelo, honora civitano de urbo Tiĥvino; esperantiĝis en la 1930-aj, Esperanto-veterano. Li lernis Esperanton en la 1930-aj jaroj, poste fariĝis fakulo pri la franca lingvo, arma tradukisto, dum la 2-a mondmilito heroe batalis. Li ricevis la plej altan ordenon *Lenin*, ordenon *Ruĝa Standardo*, multajn aliajn ordenojn kaj medalojn. Post la milito Nikolaj Zverev dum multaj jaroj havis la oficon de militataŝeo ĉe la ambasado de Sovetunio en Francio. Nikolaj Zverev venis la Esperanto-kurson en Tiĥvino tuj post ĝia ekfunkcio en la 1973, kaj restadis klubano tiom aktiva, kiom ebligis al li la multenombraj sociaj okupoj.

